

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

7

1996

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Flugado

Foto de LI YUWEI

## INTER NI

Laŭ PIV -ilion/ estas sufikso uzata post numeraloj indikanta potencon de miliono, kaj -iliard/ signifanta milion da -ilionoj. Do anstataŭ la neregulaj biliono, kvadriliono, kvintiliono, noniliono oni prefere uzu la regulajn kunmetaĵojn duiliono, kvariliono, kviniliono kaj naŭiliono. Ĉe substantivoj oni povas ellasi la finaĵon -o: duilion, kvarilion... Kiaj argumentoj kontraŭas la diron "milion unu" homoj. En la ĉiutaga uzo tiaj numeraloj estas tro maloftaj, por mallongigi ilin.

**DETLEF MEIER**  
(Germanio)

Ĉiujn artikolojn mi kompreneble ne kapablas detale tralegi, sed tiam mi la numeron almenaŭ trafolumas kaj elektas kelkajn partojn por detala studo. La mallongaj novaĵoj estas ĉiam nepre

legataj. Ĉiam mi admiras la altan lingvonivelon de la plejparto de la tekstoj kaj kompreneblecon de terminoj por nocioj en nia lando nekonataj. Foje tamen mi trovas esprimon malfacile kompreneblan, ekz. "promenanta traktoro" /EPC 1995, n-ro 9, p. 7, dua alineo/. Ĉu vi povas klarigi la signifon de tiu ĉi esprimo?

**ZDENĚK HRSĚL**  
(Ĉeĥio)

*Ni bedaŭras, ke en niaj artikoloj troviĝas vortoj kaj esprimoj malfacile kompreneblaj. Estas ĉiam bonvenaj al ni opinioj kaj kritikoj de niaj legantoj pri nia revuo.*

*Mag. Zdeněk Hrsěl skribis al ni, ke la esprimo "promenanta traktoro" estas malfacile komprenebla. En nia revuo ni iam uzis ĝin, kiu signifas malgrandan traktoron, kiu iras malrapide, kva-zaŭ promene.*

**La Red.**

96/2376/d




# ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Ĉinio: Magneta temo
- 7 *EKONOMIE:*  
Naŭa Kvin-jara Plano de Ĉinio
- 8 *VOĈO DE E-ISTOJ:*  
Esprimo de pasivo
- 9 *ĈINAJ E-ISTOJ:*  
Klarneto kaj Esperanto
- 12 Mia vojaĝo en Koreio
- 14 *ESP-NOVAĴOJ*
- 15 *POR KOMENCANTOJ:*  
Azeno en leona felo (Fablo); Lupo kaj ŝafidoj (Fablo)
- 16 Xie Jun, eksreĝino de monda virina ŝakludo
- 17 Tangshan restariĝis
- 21 *EN ĈINAJ URBETOJ:*  
En ŝtona urbeto
- 24 *MIA VIVO:*  
Kiel mi laboras en zoo?
- 25 Presentado sur subportilo
- 26 *ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:*  
Nacio de fiŝkaptado
- 28 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*  
Vojaĝo en Tianshui
- 35 *KORESPONDI DEZIRAS*
- 36 Blanknaĝila delfeno — trezoro de Ĉinio
- 38 *ĈINA KULTURO:*  
Media protektado en la antikva Ĉinio
- 40 Antikva urbeto Zhongxiang
- 42 *SUR NIA LIBROBRETO:*  
Puzlero, plezuro, perlujo
- 44 Turismko ne plu estas revo
- 46 *KURANTAJ AFEROJ*
- 48 Tri bovloj da vino de tu-oj
- 50 *GALERIO:*  
Arĝenta kruĉo kun dancanta ĉevalo
- SUR LA KOVRILO:*  
Patrino kaj filino Foto de **Liu Qijun**
- 2 Flugado

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Tangshan (p. 17)
2. Chongwu (p. 21)
3. Zhongxiang (p. 40)
4. Qugou-vilaĝo (p. 25)
5. Huzhu-a Tu-nacia Aŭtonoma Gubernio (p. 48)



# ĈINIO: MAGNETA TEMO

**C**IUJARA sesio de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj tiu de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco ĉiam altiras al si pli-malpli grandan atenton de la tutlanda popolo, ĉar, kvankam diferencaj estas la temoj de ĉiu kongresa sesio kaj ĉiu konferenca sesio, tamen ĉiufoje definitive naskiĝas gravaj politikaj orientiloj kaj leĝoj koncerne la vastajn popolamasojn de Ĉinio. La ĉijara sesio de la kongreso kaj tiu de la konferenco okazintaj en la komenco de marto aparte rimarkindis pro tio, ke la Kvara Plena Sesio de la Oka Tutlanda Popola Kongreso aprobis la “Skizo pri la Naŭa Kvin-jara Plano por Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolviĝo kaj Perspektivaj Celoj ĝis la Jaro 2010 de la Ĉina Popola Respubliko”. Ĝi estas programa dokumento markanta, kiel multe ŝanĝiĝos la sinteza ŝtata potenco kaj la popola vivnivelo en la venontaj kvin kaj dek kvin jaroj de Ĉinio. Dum la menciitaj du sesioj, la ĉeestantoj faris viglan diskutadon. Ĉi-sube estas kelkaj problemoj forte influaj en la diskutado.

## TURNI RIGARDON AL LA CENTRA KAJ OKCIDENTA LANDPARTOJ

Antaŭ dekkelkaj jaroj, kiam Ĉinio malfermis sian pordon al la mondo, marbordaj urboj en la sudorienta landparto, plene utiligante favorajn politikojn de la ŝtato, evoluigis sian ekonomion kaj plie,

kunkondukis la tutan ĉinan ekonomion al rapida evoluo. Samtempe, kaŭze de malsamaj politikoj kaj la geografia situo, la centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio relative postigis en la ekonomia evoluo. Sekve de tio aperis mal ekvilibro de ekonomia evoluo inter la orienta landparto kaj la okcidenta.

Sciu tamen, ke la centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio vastas je la areo kaj multas je la loĝantoj. Nur tiam, kiam la ekonomio de tiuj landpartoj kuratingos la tutlandajn evoluajn paŝojn, la ĉina ekonomio povos esti rigardata rapide disvolviĝanta. Pro tio, la ĉeestantoj de la du sesioj proponis al la ŝtato, ke ĝi atentu la ekonomian disvolvon de la centra kaj okcidenta landpartoj, subtenu la tiean ekonomian disvolviĝon per favoraj politikoj kaj monhelpo, cele malgrandigi la distancon inter la orienta landparto kaj la okcidenta en la ekonomia evoluo. Fakte tio ja estos strategio alprenota de la ŝtato en la estonta ekonomia ekspluatado.

La ŝtato prenis efektivegeblajn rimedojn por rapidigi la ekonomian evoluon de la centra kaj okcidenta landpartoj, kaj tiuj estas efikodonantaj. En la supremenciita “Skizo”, oni grandpage eksplikis tiun ĉi strategion de la ĉina registaro.

S-ro Wang Ren’an, reprezentanto de la Popola Kongreso kaj vices-tro de la provinco Qinghai de la okcidenta parto de Ĉinio, diris:

“La centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio abundas je riĉfontoj. En la provinco Qinghai, krom kristalo, estas ankaŭ oro, antimono kaj aliaj raraj minajoj. La baseno Qaidam (Ĉajdam) de la provinco abundas ne nur je granda kvanto da petrolo kaj natura gaso, sed ankaŭ je neferaĵoj metaloj kaj kemiindustriaj krudmaterialoj. Post ekspluatado de tiuj ĉi riĉfontoj, la dezerta baseno fariĝos ekonomia centro de la tuta provinco. Kompreneble, samtempe kun ekspluatado de la riĉfontoj, oni nepre devas atenti pri protektado de la natura medio kaj ekologia ekvilibro. En la ekspluatado de Qinghai-lago, oni iatempe fermis la lagon por malpermesi kapton de gimnociprino (Gymnocypris przewalskii).” S-ro Wang Ren’an diris ankaŭ, ke por la ekologia medio de Qinghai, la provinca registaro serioze diskutos pri ĉiu projekto kaj faros koncernajn decidojn.

Tre grava enhavo de reduktado de la ekonomiaj diferencoj inter la orienta landparto kaj la okcidenta estas elimini malriĉecon. En Ĉinio nun ankoraŭ ekzistas 65 milionoj da malriĉaj loĝantoj, al kiuj mankas manĝaĵoj kaj vestoj, kaj pli ol 90% el ili vivas en la centra kaj okcidenta landpartoj. Pro tio, la “Skizo” montras, ke en la periodo de la Naŭa Kvin-jara Plano, la ĉina registaro pliigos la subtenon kaj helpon al tiuj lokoj kaj decidis, ke la ŝtato investos al tiuj landpartoj por konstruado de nombro da inĝenieriaĵoj, aparte substrekante la konstruadon de la bazaj instalaĵoj, kiaj fervojo, ŝoseo kaj elektro-



energia, komunika kaj akvoutiliga inĝenieriaĵoj.


Ankaŭ aliaj provincoj, municipoj kaj regionoj de la tuta lando fervore subtenas konstruadon en tiuj lokoj. Iuj regionoj de la orienta landparto reordigas sian industri-an strukturon kaj paŝopostpaŝe translokas okcidenten iujn entreprenojn, kiuj prilaboras krudmaterialojn kaj tipas je la labora koncentriĝo. Sole en Ŝanhajo pli ol 2 mil entreprenoj estos translokitaj al centra kaj okcidenta lokoj. Tio liveros pli da enoficiĝaj ŝancoj al la loĝantoj de tiuj lokoj kaj akcelos la tian ekonomian evoluon.

S-ro Wu Renbao, reprezentanto de la vilaĝo Huaxi de la provinco Jiangsu en la orienta landparto, diris al mi, ke en la venontaj 5 jaroj la vilaĝo Huaxi ĉiujare monferos por trejni 20 mil teknikistojn por la okcidentaj malriĉaj regionoj, helpos centmilon da loĝantoj de la centra kaj okcidenta landpartoj, por ke ili liberiĝu el malriĉeco antaŭ la jaro 2000, kaj dekmilo el ili vivu bonhavan vivon. La vilaĝo Huaxi antaŭe estis malriĉa kaj poste sin prosperigis per penema laborado. Riĉiĝintaj Huaxi-anoj ne forgesis la malriĉajn samlandanojn de la okcidenta landparto. Ekde 1994, ili donas trejnatan ŝancon al 2 800 homoj. Krome, ili trans-province ekspluatit 1 300 hektarojn da virgatero, kiuj ĉiujare jam donos rikolton. Tiamaniere ili efike helpas malriĉajn samlandanojn.

## FUNDAMENTI NACIAN PROSPERON SUR SCIENCOKAJ EDUKADO

La "Naŭa Kvin-jara Plano" kaj

la "Perspektivaj Celoj ĝis la Jaro 2010" reliefigis la strategion prosperigi Ĉinion per scienco kaj edukado, ĉar tio estas ekstreme grava por la ĉina moderniga konstruado kaj por transiro de ekonomia kreskado el la neintensa en la intensan, kaj tiu de la ekonomia sistemo el la planizita ekonomio en la merkatan.



Jilin-provinco ricevis riĉan rikolton de greno en 1995. La foto montras grenejon de unu el ĝiaj distriktoj.

La ĉeestantoj de la du sesioj opiniis, ke en la nova jarcento, la konkuro estos tiu pri sciencoj, teknikoj kaj talentuloj. Tio do estigis jenajn temojn: la unua, plirapidigi disvolvon de altaj sciencoj kaj teknikoj, kaj la alia, pliigi investon al edukado.

Reprezentantoj el la scienc-teknikaj rondoj opiniis: En nemalmultaj kampoj de scienco kaj tekniko, Ĉinio estas postĝinta kompare kun evoluantaj landoj. Ekz., la pokapa energia kvanto de Ĉinio

estas nur duono de tiu de la mondo, sed la energia konsumado de Ĉinio ne malaltas, precipe en la entreprenoj de forĝo, ferŝtalo, oleorafinado, kaŭstika sodo, paperfarado, vitro ktp. Laŭ antaŭkalkulo, se ne ŝanĝiĝos la nuna ekonomia strukturo de Ĉinio, do en la jaro 2010 energio fariĝos serioza problemo detenanta evoluadon de la ĉina ekonomio. La severa situacio devigas Ĉinion reordigi la ekonomian strukturon kaj prioritare disvolvi novajn kaj altajn teknikojn. La "Skizo" eksplicite montras, ke rapidigante la paŝojn de altteknika industriigo, Ĉinio devas dediĉi grandan atenton al disvolvo de la teknologioj de pasager-kaj vartransportado de fervojoj, trafiko, elektroenergio, fabrikado kaj la elektronika kaj aŭtomatiza teknologioj de la terciara industrio, la nova teknologio de petrola putoborado kaj ekspluatado kaj la teknologio de grandkapacita cifera programo-rega ŝanĝilo ktp.

Agronomoj opiniis, ke nun la kontribua proporcio de la ĉinaj sciencoj kaj teknikoj al agrikulturo nur atingis proksimume 35%, kaj

en la periodo de la Naŭa Kvin-jara Plano tiu leviĝos al 50%. Tio signifas, ke por levi la agrikulturan produktokvanton pere de sciencoj kaj teknikoj, Ĉinio devas efektive solvi la problemon transformi la agrikulturajn sciencajn kaj teknikajn fruktojn en la realajn produktajn fortojn, por ke la tradicia agrikulturo iom post iom transformiĝu en la modernan. Ili proponis plupaŝe disvolvi la kamparan profesion edukadon kaj konstante altigi la scienc-teknikan kleracon de la

kampanoj.

Rilate la edukadon, mi informigis, ke en la pasintaj jaroj, la ĉina registaro jam eksplicite elmetis la ideon pri la prioritata disvolvo de edukado, kaj komencis pliigi investon ĉiflanke. En 1991-1994, la elspezo por edukado pliigis ĉiujare je 19.44%, samtempe kun tio ankaŭ diversnivelaĵoj registaroj pliigis sian mon-asignon al ĝi. En 1995 la speciala monsumo por la deviga edukado en la malriĉaj regionoj kaj tiu por kulturaj altnivelaĵoj talentulojn por la 21-a jarcento ambaŭ ekestis uzataj. Ĝis la jaro 2000, la du specialaj monsumoj kaj la kompleta kapitalo respektive superos 100 miliardojn da ĉinaj juanoj. La ĉeestantoj de la du sesioj esprimis, ke por realigi celojn de la "Skizo", t.e. en la jaro 2000, la naŭjara deviga edukado fundamente populariĝos, 99% de la lernoagaj infanoj lernos en elementaj lernejoj, 85% de la diplomitiĝintoj de la elementaj lernejoj daŭrigos sian lernadon en mezlernejoj, kaj la analfabetoj konsistigos nur 5% de la junuloj kaj mezaĝuloj. Ĉinio alfrontas grandan malfacilon kaj bezonas komunan klopodadon fare de la registaro kaj la tuta socio.

## ESPERO DE AGRIKULTURO

Agrikulturo estas unu el la fokusaj temoj de la ĉi-foja kongresa sesio. La kaŭzo kuŝas en tio, ke garantii la kontinuan kaj stabilan kreskadon de agrikulturo kaj la agrikultura ekonomio estos gravega kaj plej malfacila tasko en la estontaj 15 jaroj.

Ĉu Ĉinio kapablos mem solvi la problemon pri sia nutrado en la venonta jarcento aŭ ne? Pri tio zorgas ne nur la ĉinoj, sed ankaŭ la tuta mondo. Iu alilanda institucio antaŭkalkulis, ke en la komenco de la sekvanta jarcento, Ĉinio bezonos ĉiujare importi 200-300 milionojn da tunoj da grenoj, kaj per tio ĝi levis la demandon: "Kiu vivtenos Ĉinion?" Kun plena memfido, s-ro Liu Jiang (Liŭ Ĝjang), reprezentanto de la Popola Kongreso

kaj ministro de la Agrikultura Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko, diris: "En la jaro 2030, kiam la ĉina loĝantaro atingos la pintan nombron — 1.6 miliardon, Ĉinio bezonos, antaŭkalkulate, 600 milionojn da tunoj da grenoj. Deduktate laŭ la nuna produktokvanto, tio realiĝos, se nur la jara meznombra grena produktokvanto kreskos je proksimume 4 miliardoj da kilogramoj en la venontaj 35 jaroj. Fakte, en la pasintaj 46 jaroj post kiam fondiĝis la nova Ĉinio, la jara meznombra pliprodukta kvanto de grenoj estis ĉ. 8 miliardoj da kilogramoj. Kun senĉesa pliigado de asignoj kapitala, materiala, scienca kaj teknika, la sinteza produkta povo de agrikulturo altiĝos kontinue. Ĉinio certe solvos la problemon pri nutrado depende de si mem."

La disvolviĝo de la ĉina agrikulturo ofte superis nian imagon. En la lastaj 5 jaroj, la jara averaĝa kresko de agrikulturo estis 4.1%. S-ro Su Zaixing (Su Zajŝing), kampana reprezentanto el la provinco Heilongjiang (Hejlongĝjang), diris: "Mi kultivas grenojn jam 40 jarojn, kaj travivis la ŝanĝiĝon de la ĉina grena produkta povo de 150 milionoj da tunoj en 1952 al 465 milionoj da tunoj en 1995. Tio vere estas malfacilege atingebla, tamen ni atingis efektive."

S-ro Nie Wenquan (Nje Ŭenĉŭjan), urbestro de Baicheng de la provinco Jilin, nordorienta Ĉinio, montris ankoraŭ pli grandan konvinkiĝon. Li diris: En la subprovinco Baicheng, nun estas proksimume 580 mil hektaroj da agroj, el kiuj 520 mil hektaroj estas mezaltaj aŭ malaltaj je la produktokvanto. Tiele, ekzistas granda latentaj forto por altigi la pohektaran produktokvanton. En la venontaj 5 jaroj, ĉiu hektaro pliprodukta almenaŭ mil kilogramojn da grenoj dank' al scienca kultivado, racia densplantaĵo, plibonigo de specoj, transformado kaj pliigo de akvokampoj per riĉaj subteraj akvofontoj. Nun, en la nomita subprovinco

troviĝas pli ol 260 mil hektaroj de ekspluateblaj kampoj. De la lastaj jaroj alvenas multaj entreprenoj kaj kampanoj el aliaj provincoj por investado kaj ekspluatado. Se ĉiu hektaro produktos 4 mil kilogramojn da grenoj, do ni pliproduktaĵojn da grenoj, do ni pliproduktaĵojn da grenoj, t.e. post 5 jaroj, la grena produktokvanto de la subprovinco duobligos kaj atingos 3.3 miliardojn da kilogramoj. S-ro Nie diris ankaŭ, ke la simila stato estas populara en la gren-produktejoj de nordorienta Ĉinio.

Ĉinio estas granda agrikultura lando, sed ĝia administrado ĝenerale estas tradicia. Tial, kiamaniere oni faros la grandskalan entreprenadon de agrikulturo, realiĝos la agrikulturan modernigon kaj puŝos agrikulturon al merkato, tio estos temo serioze konsiderata de multaj reprezentantoj. Ili interesiĝis pri la modelo "Kompanio + Kampana Familio" rekomendita de reprezentanto Fan Run, rektoro de Agronomia Universitato. Ĝi fakte estas novtipa proviz-venda kooperativo organizita de kampanoj mem. La kooperativo faras por la kampanoj kompleton da sociaj servoj: liveri al ili bonajn semojn, helpi ilin en preventado kaj eliminado de plantmalsanoj kaj fiinsektoj, aĉeti iliajn produktaĵojn, kaj per nemulta investo, oni sukcese rikoltas en la kampara industriigo.

Reprezentantoj el la agrikultura fronto raportis, ke nun altiĝas la gren-kultivada aktiveco de la kampanoj. Sed por bone teni kaj evoluigi tiun aktivecon necesas solvi la problemojn koncerne la interesojn de kampanoj, ekz. nun la prezoj de produktaj rimedoj estas altaj, tiuj de grenoj malaltaj, ŝarĝo de kampanoj relative peza ktp. Mi informigis, ke la ĉina registaro estas preta alpreni konkretajn rimedojn por solvi tiujn problemojn por protekti la gren-kultivadan aktivecon de la kampanoj kaj impulsi la grenan produktokvanton al kontinua kaj stabila kreskado. ■



# Naŭa Kvin-jara Plano de Ĉinio

de ZHANG WEN

**L** 996 estas la unua jaro de la Naŭa Kvin-jara Plano por Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolviĝo. Antaŭ la jaro Ĉinio bone plenumis la taskojn difinitajn por la antaŭaj ok Kvin-jaraj Planoj. Dank' al plenumiĝo de la lastaj kelkaj Kvin-jaraj Planoj, rimarkinde progresis la ĉina nacia ekonomio. Kaj la Oka Kvin-jara Plano estas rigardata kiel la plej bone plenumita post 1953, en kiu komenciĝis la Unua Kvin-jara Plano de Ĉinio.

En la periodo de la Oka Kvin-jara Plano la jara averaĝa pliiĝo de la totala valoro de la ĉina nacia produktado atingis 12% kaj estis difinitaj la celo kaj framo de la socialisma merkata ekonomio. Pluapaŝa reformado okazis en la kampoj de imposto, financo, valuto, ekstera komerco, investo, prezo kaj cirkulo; rimarkinde progresis reformado en preza sistemo, imposta sistemo kaj tarifo-identigo; krom ĉemaraj urboj, estis malfermitaj ankaŭ aliaj urboj, kaj la malfermado ampleksas ne nur la kampon de prilaboroj, sed ankaŭ tiun de bazaj industrioj kaj instalaĵoj; estis lanĉita nombro da grandaj kaj mezgrandaj bazaj instalaĵoj, inkluzive de akvoutiligaj, energiaj, trafikaj kaj telekomunikaj, kio certagrade akcelis la disvolviĝon de nacia ekonomio; estis akiritaj 160 000 scienc-teknikaj fruktoj; populariĝis deviga edukado en la regionoj, kies loĝantaro konsistigas 90% de tiu de Ĉinio; trorapida kresko de la ĉina loĝantaro estis bremsita; la nombro de la malriĉaj loĝantoj, malkreskis de

85 milionoj en la 80-aj jaroj al 65 milionoj nun; la jara pokapa enspezo de la urbanoj por la vivo pliiĝis je 7.7% post dekalkulo de la prezaltiĝo; kaj tiu de la kamparanoj je 4.5%.

Kompreneble, en tiu ĉi periodo Ĉinio alfrontis ankaŭ multajn problemojn kaj malfacilojn. Inter ili frapis kompare serioza inflacio, kiu levigis podetalajn prezojn averaĝe je 11.4% ĉiujare en la pasintaj kvin jaroj; la ŝtataj entreprenoj havis pli da malfaciloj; agrikulturo restis malforta en la nacia ekonomio; la rilatoj inter enspezo kaj distribuo ankoraŭ ne raciigis; koruptiĝado ankoraŭ disvastiĝis; malbone statis publika sekureco en iuj lokoj.

Komence de la nuna jaro la ĉina registaro ellaboris "La Skizo de la Naŭa Kvin-jara Plano por Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolviĝo kaj la Perspektivaj Celoj ĝis la Jaro 2010". En la skizo estas difinitaj ne nur la taskoj de la Naŭa Kvin-jara Plano, sed ankaŭ tiuj en la unuaj dek jaroj de la venonta jarcento. La venontaj 15 jaroj estos grava periodo por reformado kaj socialisma konstruado de Ĉinio. Alivorte, efektiviĝo de la celoj difinitaj en la skizo signifas, ke Ĉinio eniros en la 21-an jc kun tute nova fizionomio.

La supre diritaj taskoj estas jene: En 2000 Ĉinio havos malpli ol 1.3 miliardojn da loĝantoj. La totala valoro de la ĉina nacia produktado estos 8 500 miliardoj da juanoj (5 760 miliardoj da juanoj en 1995. 8.3 juanoj egalas unu

usonon dolaron). Malriĉeco estos fundamente nuligita kaj la popolo vivos bonhavan vivon. Kun rapida ellaboro de moderna entreprena sistemo estos starigita la primara sistemo de socialisma merkata ekonomio. En 2010 la totala valoro de la ĉina nacia produktado duobliĝos, kompare kun tiu en 2000. Kaj la socialisma merkata ekonomio fariĝos kompare perfekta.

Koncerne la rapidecon de ekonomia disvolviĝo, la skizo montras, ke en la periodo de la Naŭa Kvin-jara Plano la totala valoro de la ĉina nacia produktado pliiĝos 8% ĉiujare. La jara pokapa enspezo de la urbanoj por la vivo pliiĝos je 5%; tiu de la kamparanoj je 4%; la pokapa loĝareo de la urbanoj de 7.9 kvadrataj metroj al 9. Laŭ antaŭkalkulo en la skizo pri ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj produktoj, en 2000 la grena produktokvanto estos 490-500 milionoj da tunoj; la kotona — 4.5 milionoj da tunoj; la nafta — 155 milionoj da tunoj...

En la venontaj kvin jaroj, kiel antaŭe, Ĉinio prenos agrikulturon kiel la plej gravan por la disvolviĝo de la lando. Necesas plimultigi investon por agrikulturo kaj akcenti sciencan terkulturadon kaj protekti la aktivecon de la kamparanoj pri grena produktokvanto. La skizo aparte emfazas la strategion de prosperiĝo de la lando per sciencoj kaj edukado, disvolviĝon de bazaj instalaĵoj kaj industrioj, plifortigon de helpo al la malriĉaj regionoj kaj daŭrigon de la politiko de pordomalfermo al la mondo. ■

# Esprimo de pasivo

de C. STØP-BOWITZ (Norvegio)

En “El Popola Ĉinio”, n-ro 4, 1995, Bruno Vogelmann prezentis artikolon “Erara uzo de -iĝ”. Unue li prezentas tri kazojn de uzo de -iĝ. Pri la unua kazo, tiu de ŝanĝo de kvalito, ne ekzistas diferenco de opinioj. La dua kazo estas uzado anstataŭ regula pasivo. Kvankam oni ne malofte vidas tian uzadon, ne estas dubo pri tio, ke ĝi estas erara, -iĝ havas precipe medialan, ne pasivan senco. La tria kazo, tiu de refleksi-vo, estas ĝenerale akceptita, kaj ĝi apenaŭ estas uzata en la konstruita, pasiva senco, kiun aludas Bruno Vogelmann. Sed eble estus interese vidi, kion Zamenhof diris pri la esprimo “mi sidiĝis”, kaj jen kopio de lia tiurilata artikolo en Lingvaj Respondoj:

## PRI “SIDIĜI” KAJ “EKSIDI”

*Vi estas prava: anstataŭ “sidiĝu” estus pli bone diri “sidigu vin” aŭ “eksidu”; tamen ĉar la formo “sidiĝu” jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam “esperantismo” kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas. Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolutan, logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzerciĝado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la*

*unua jaro ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton. Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi nur tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas malpermesata, — en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj li povas esti konvinkita, ke se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan formon malnovan.*

*Respondo 3, “La Revuo”, 1906, Decembro.*

Sed kiel do oni esprimas en Esperanto la pasivon? Efektive al Esperanto mankas simplaj pasivaj verboformoj (kiuj ja ekzistas en multaj aliaj lingvoj). Laŭ la Fundamento: “Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per la helpo de responda formo de la verbo *est* kaj la participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio de la pasivo estas *de*. Ekz.: ŝi estas amata de ĉiuj.” Ĉi tiuj iom komplikitaj formoj kaŭzas ke la pasivo estas multe malpli uzata ol en naciaj lingvoj, kiuj posedas simplajn pasivajn formojn.

Sed nun Bruno Vogelmann diras: “Cetere ekzistas multe pli eleganta eblo uzi kurtigitan (tiele!) formon de pasivo, ne pere de -iĝ, sed pere de la sufiksoj -at, -it, -ot. Do anstataŭ ‘li laŭdiĝis’ ni

povas tute korekte (tiele!) diri ‘li laŭdatis’...” Ni vidu, kion Zamenhof en Lingvaj Respondoj diras pri tiu “solvo”:

## PRI LA PARTICIPA SUFIKSO ANTAŬ VERBA FINIĜO

*La formoj “amatas”, “amitas” k.t.p., anstataŭ “estas amata”, “estas amita”, per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia propra iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se “as”, “is” k.t.p. signifus “estas”, “estis”; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo “esti”, tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas.*

*Respondo 15, “La Revuo”, 1907, Aprilo.*

Tiaj formoj estas de tempo al tempo uzataj de samopinianoj de Bruno Vogelmann, sed ili ne trovis ĝeneralan aprobon en pli vasta publiko, evidente tial ke ilia senco ne estas tuj kaptebla, oni devas ĉiufoje kvazaŭ analizi ilin en la menso, kaj nek la iama Lingva Komitato, nek la nuna Akademio de Esperanto iam akceptis ilin.

Mia rekomendo estas uzi aktivan formon ĉiam kiam eble, sed uzi la fundamentajn formojn kiam oni nepre bezonas pasivan prezenton de sia penso. ■



# Klarneto kaj Esperanto

de YIN QIN

**E**N 1970 la 15-jara Cheng Yonghua adiaŭis sian hejmvilaĝon en Henan-provinco kaj venis al Pekino por lerni ludadon de klarneto. Tri jarojn poste, li membriĝis al la Ĉina Armea Fanfaro, la plej granda en Ĉinio. De tiam klarneto ĉiam akompanas lin.

S-ro Cheng Yonghua diligente lernis pli ol 20 jarojn. Nun li povas lerte ludi klarneton. Multfoje li prezentis en diversaj lokoj de la mondo kaj ludis por honoraj alilandaj gastoj vizitantaj Ĉinion. En siaj vizitoj al aliaj landoj li komprenis, ke muziko havas valoron de internacia lingvo. En Singapuro, Tajlando, Finnlando kaj Rusio lia prezentado ĝojigis la spektantojn, kiuj eĉ larmis pro la melodio, kaj sur la scenejo li mem estis ebria de la muziko. La sukceso de la prezentadoj — la gajajn ridojn kaj aplaŭdojn — oni atribuis al la diligenta laboro de li kaj liaj gekolegoj.

Por s-ro Cheng peniga laboro kaj ĝojiga sukceso estas ĝemeloj. Heredis lian talenton lia filino, mezlernejanino, kiu lerte ludas klarneton kaj elektronikan harmonikon. Ŝi eklernis ludi elektronikan harmonikon en sia 5-jara aĝo. Nun la lernejo kulturas ŝin kiel lernantinon kun speciala talento. Ŝi vizitos Hongkong kiel membro de orkestro de pekinaj mezlernejaninoj. Ŝia patrino estas kuracistino, kiu prenis sur sin la tutan dommastrumadon favore



S-ro Cheng Yonghua  
Foto de ZHAO XI

al la du “kulturaj senditoj” — la edzo kaj la filino. La familio kune dividas la malfacilon kaj ĝojon, kiujn muziko alportis al ili.

En 1984 s-ro Cheng eklernis Esperanton. De tiam ne nur muziko, sed ankaŭ Esperanto estas grava parto de lia vivo. Li multe prezentis por samideanoj, kaj ĉi tiuj plezure ĝuis lian muzikon. Li ludis klarneton en la Unua Internacia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto. Li prezentis por japanaj Oomotanoj, kiuj vizitis Ĉinion. Por la pekinaj samideanoj li esperantigis la muzikan fabelon “Petro kaj Lupo”. Li partoprenis la organizadon de la junulara vespero de la 71-a UK en 1986 en Pekino. Kvankam li estis tre okupita, tamen li aktive partoprenis ĉiun renkontiĝon de pekinaj esperantistoj.


Neniam li forgesos sian viziton

al Hamina de Finnlando. En lia hotelo longe atendis lin loka e-isto, kiu poste venadis por ĝui ĉiun lian prezentadon. Li gastigis s-ron Cheng kaj liajn kolegojn, kiuj admiris: Cheng havas amikon eĉ en tia fremdlanda urbeto! La plej granda ĵurnalo de Helsinko raportis pri tio. Kiam s-ro Cheng vidis foton pri si en la ĵurnalo, kaptis lin la ideo pere de Esperanto konigi Ĉinion kaj la ĉinan muzikon al alilandanoj. Do li fariĝis delegito de la Muzika Esperanto-Ligo en Ĉinio. Li interŝanĝis partiturojn kun aliaj esperantistoj, ĉar li kredas, ke kvankam ne eblas por li prezenti ĉie, tamen partituroj povas atingi pli multajn lokojn.

Ofte li bedaŭras, ke li mal multe prizorgis siajn gepatrojn, kiuj maljuniĝas kaj loĝas en la malproksima hejmloko. Foje li venigis sian patrinon al Pekino por kune vivi, tamen ŝi ne kutimis al la urba vivo kaj fine revenis al la hejmloko. Ofte li klopodis elturni sin el la sopiro al la gepatroj por sin ĵeti en sinsekvajn prezentadojn.

S-ro Cheng Yonghua deziras ĝui koncerton de alilandaj orkestroj kun esperantistoj. Tiam li povos fari pli multe por interŝanĝo de muziko kaj Esperanto. Li opinias, ke Esperanto kaj muziko ambaŭ estas ponto de komunikado inter la popoloj. ■

# 5-JARIGO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO



1. S-ro Cheng Yonghua (la tria de maldekstre en la antaŭa vico) en la kunveno festanta la 45-jariĝon de la Ĉina Esperanto-Ligo Foto de LI YUWEI

2. S-ro Cheng Yonghua (dekstre) en muzikludo Foto de ZHAO XI

3. S-ro Cheng Yonghua kaj liaj familianoj en parko Foto de ZHAO XI

4. S-ro Cheng Yonghua (dekstre) gastas en esperantista familio de Finnlando.

5. S-ro Cheng Yonghua kaj finnlandaj knabinoj

1 4

2

3 5







# Mia vojaĝo en Koreio

**L**Aŭ invito de la Korea Esperanto-Asocio (KEA), mi, kiel parolistino kaj raportistino de la Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia (ĈRI), ĉeestis la 27-an Korean Kongreson de Esperanto okazintan en la antikva urbo Iksan fine de oktobro, 1995. Post la kongreso mi vizitis Seulon, Taegu, Pohang, Pusan kaj aliajn urbojn. Ĉie, kie mi estis, mi ricevis varman akcepton de koreaj esperantistoj. La vigeleplena E-movado kaj la sukcesa nacia kongreso de Esperanto, la profunda sento de koreaj samideanoj al la Esperanta disaŭdigo de ĈRI kaj al ĉinaj esperantistoj faris sur min profundan kaj neforgeseblan impreson.

## NIAJ KOREAJ AŬSKULTANTOJ

Koreio estas najbaro de Ĉinio, tamen ni apenaŭ ricevas el ĝi leterojn pri nia Esperanta disaŭdigo. Dum la vizito mi ĝoje vidis, ke ni havas multajn fervorajn aŭskultantojn en Koreio. Ĉirkaŭ 30 personoj ĉeestis la Kunsidon de Aŭskultantoj de ĈRI speciale aranĝitan de KEA. Tio ja estis ekster mia atendo. Ili tre ĝoje renkontiĝis kun mi bone konata laŭ mia voĉo. Ili alte taksis la kontribuojn de nia laboro al la E-movado kaj al profundigo de iliaj konoj pri Ĉinio kaj ankaŭ elmetis valorajn proponojn por plibonigi nian laboron.

Komisiite de KEA, s-ino Kim Uson, unu el niaj koreaj aŭskultantoj, zorgis pri mia vojaĝo. Ŝi iam skribis al ni leteron. Je nia unuafoja renkontiĝo ni tuj rekonis unu la alian. Ŝi zorgeme faris ĉion

eblan por mia restado en Koreio kaj gastigis min 4 tagojn en sia hejmo, tie sentebliis ia aparta etoso. Pri tio ŝi diris: "Sur la mondmapo ne troveblas Esperantujo, sed mi povas ĝin krei hejme." En ŝia legoĉambro troviĝas diverslandaj Esperantaj vortaroj kaj libroj. Kio plej altiris mian atenton, estas kasedoj kun indikitaj datoj bonorde



La aŭtoro (maldekstre) kaj d-ro Lee Chong-Yeong, nova prezidanto de UEA

starantaj en la libroŝranko. S-ino Kim diris, ke ŝi aŭskultis nian disaŭdigon jam 8 jarojn, la kasedoj estas parto de niaj programoj registritaj en la lastaj jaroj, multaj kasedoj de pli fruaj elsendaĵoj estas konservataj aliloke. Ŝi registris niajn programojn ne nur por sia ripetfoja aŭskultado, sed ankaŭ por ke aliaj aŭskultu. Je tio mi emocie esprimis al ŝi miajn korajn dankojn, sed ŝi respondis sentoplene: "Estas mi, kiu devas diri dankon. Sen la Esperanta disaŭdigo de ĈRI ne estus mia hodiaŭo. Mi amas vian elsendon. Dank' al ĝi, mi, dommastrino, kiu vivis nur por la edzo, vidis la valoron de

Esperanto kiel internacia komunikilo kaj faris firman decidon ellerni la lingvon por koni la mondon kaj Ĉinion. Via Esperanta disaŭdigo ŝanĝis mian sorton."

Forta deziro kaj diligenta lernado kondukis s-inon Kim al sukceso. Nun ŝi, kiel direktoro de KEA kaj faka delegito de UEA en Seulo, tre aktivis en la korea E-movado. Ŝi ankaŭ sin okupas pri esperantigo de koreaj libroj kaj instruado de Esperanto. Dank' al ŝia klopodado, nemalmultaj dommastrinoj aliĝis al la esperantista vicaro. Mi sentas ĝojon kaj fieron, ke ni havas tiel fidelan aŭskultanton. Mi vidis en ŝi admirindan sindonemon de esperantisto.

## GASTADO ĈE UEA-PREZIDANTO

Post la kongreso, mi havis la honoron gasti 2 tagojn ĉe prof. Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA. Prof. Lee kaj lia edzino tiel afable kaj amike gastigis min, ke mi sentis min kiel hejme. Mi tre ĝojis, ke mi havis feliĉon aŭskulti liajn opiniojn kaj strategian planon pri la E-movado. Lia parolo kaj ambicio por la Esperantaj aferoj multe min pensigis kaj inspiris.

Prof. Lee tre alte taksas la ĉinan registaron, kiu subtenas Esperanton, favorante la Esperantan disaŭdigon kaj la eldonadon de la Esperanta revuo "El Popola Ĉinio". Li diris: "La Esperanta disaŭdigo de ĈRI estas la plej multe kaj plej vaste aŭskultata en la mondo. La ĉiutaga elsendo al ĉiuj kontinentoj montras, ke Esperanto ne plu estas provprojekto, sed reala fakto. Ĉiutage, precipe post UK, multaj esperantistoj tra la mondo aŭskultas



la specialan programon de UK. UEA dankas al ĈRI pro tio.”

Kiel fama profesoro pri ekonomiko, prof. Lee estas ege okupita. Oni ofte invitas lin fari prelegon al politikistoj kaj entreprenistoj. Vespere li devas trakti faksojn kaj leterojn venintajn de UEA kaj el diversaj landoj. Malgraŭ tio, li ofte aŭskultas nian elsendon. En la 27-a Korea Kongreso de Esperanto li aŭskultigis al ĉeestantoj per sia kunportita radiorecivilo la Esperantan programon de ĈRI, esperante, ke pli multaj koreaj esperantistoj fariĝos ĝiaj aŭskultantoj. Prof. Lee multe zorgas kaj subtenas nian laboron kaj plurfoje akceptis nian intervjuon, donante tre valorajn proponojn por plibonigi nian laboron kaj pri varbado de aŭskultantoj. Fine de la pasinta jaro, li volonte plenumis nian peton registri la novjaran mesaĝon por 1996. Dank’ al li, ni unuafoje elsendis la propravoĉan novjaran mesaĝon de la prezidanto de UEA.

Aparte menciindas, ke prof. Lee estas amiko ne nur de la ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ de la tuta ĉina popolo. En lia hejmo mi vidis la diplomon “Premio de Amikeco” aljuĝitan de la ĉina registaro pro liaj kontribuoj al la moderniga konstruado de Ĉinio.

## KANDELLUMO POR ESPERANTO

Laŭ invito mi vizitis la E-Instituton kaj E-kurson de la Universitato Dankook gvidatajn de s-ro Ma Young-Tae, vicprezidanto de KEA. Mia vizito vekis ĉe junaj studentoj grandan intereson kaj scivolemon. Ili levis multajn demandojn pri niaj disaŭdigo kaj Esperanta lernado.

S-ro Ma gvidis E-kurson jam dek jarojn en la universitato kaj pli ol 4 200 studentoj lernis en la kurso. De 1995 li donas ĉiusemajne 10 lecionojn. Li trovas sian E-instruadon tre signifa.

Li diris: “En mia koro estas kandelo, kies lumon mi disdonas al miaj studentoj. Kvankam ili nun

studas nur por poentoj kaj eble tute forlasos Esperantujojn post diplomigo, tamen tiu verda semo restos en ilia koro. Ili estas latentaj fortoj de la korea E-movado. Eblas, ke iutage ili revenos, ĉar tio estas bela tempo en ilia juneco. Mi persone havis tian travivaĵon. Tial mi deziras disdoni mian kandellumon al miaj studentoj.”

S-ro Ma sukcese kompilis “Granda Vortaro Esperanto-Korea” kun ĉirkaŭ 70 000 vortoj kaj lernolibrojn. Ankaŭ la E-Instituto de la Universitato Dankook estas frukto de liaj klopodoj. Ĝojinde estas, ke la kandelo en lia koro lumas ankaŭ en lia hejmo. Lia edzino, tre bonkora kaj inteligenta, antaŭ nelonge ekmarŝis en la verdan ĝardenon. Mi certas, ke ŝi tre baldaŭ fariĝos bona E-parolanto.

## DILIGENTAJ KOMENCANTOJ

Prof. Lee Chong-Yeong diris, ke la esperantista vicaro alfrontas la problemon de maljuniĝo kaj emfazis, ke estas necese varbi senĉese gejunulojn. Al lia alvoko aktive reagas koreaj esperantistoj per funkciigo de diversaj E-kursoj, al kiuj ne mankas kurso por elementaj lernantoj. En la de mi vizititaj urboj mi renkontis multajn komencantojn, kiuj impresis min per sia diligenteo.

En Seulo estas lernogrupo nomata “Rondo Amanta” gvidata de s-ro Bak Gi-Ŭan. En lia nova loĝejo mi renkontiĝis kun la grupanoj. Ili ĉiuj estas junaj dommastrinoj kaj lernas tre entuziasme. Unu el ili nomiĝas Chong Yin-Suk. Ŝi estas serena, sprita kaj tre afabla. Ŝi havas erudician edzon kaj 2 amindajn filojn. Ŝi enamiĝis al Esperanto tuj post konatiĝo kun ĝi komence de 1995. Informiĝinte pri mia vizito al ŝia urbo, ŝi esprimis

al KEA la deziron min gastigi utile al sia lernado. Dum mia 4-taga restado ĉe ŝi, ŝi ĉiam kunportis kun si “Esperanto-Korea Vortaro”, kien ajn ni iris. Se ŝi ne komprenis ion el mia parolo aŭ ŝi ne sciis kiel diri Esperante, ŝi tuj konsultis la vortaron. Ŝi lernis Esperanton nelonge kaj ankoraŭ ne posedis sufiĉe da E-vortoj, tamen ŝi ne timis paroli kaj sin esprimi en Esperanto. Tiel ni facile komprenis unu la alian. Tiu neatendita sukceso iom mirigis ŝin kaj multe kuraĝigis ŝin. Vespere, post kiam la edzo kaj infanoj enlitigis, ŝi, kvankam laca, ankoraŭ legis kelkajn tekstojn aŭ faris ekzercojn konversaciajn. Mia 4-taga restado kun ŝi estis mallonga, tamen ŝi rimarkinde progresis en parolado de Esperanto. Ŝi tre ĝojis, ke ŝi per sia propra sperto pruvis la konatan veron: praktikaĵo estas la plej efika rimedo por



La aŭtoro (la dua de dekstre), s-ro Bak Gi-Ŭan (la tria de maldekstre) kaj E-grupanoj

altigi la parolkapablon.

Dum la vizito mi multe ĝuis la gastamon ankaŭ de D-ro Kim Yung-Myung, d-ro Bak Hŭa-Gong kaj aliaj. Ankaŭ d-ro Puramo Chong, prezidanto de KEA, estas tre gastama. Kiam mi parolis kun li pri la impresiva malavareco de koreaj samideanoj, li diris al mi: “Mi tion faras simple pro amo al Esperanto. Elspezante monon mi sentas ĝojon kaj feliĉon, ĉar mi faras tion por mia amo.”

Eble la vortoj de d-ro Puramo Chong esprimis la koron de multaj gastamaj koreaj esperantistoj. Mi kredas, ke kun tiel multaj oferemaj kaj aktivaj esperantistoj, la korea E-movado fariĝos pli brila lanterno por la tuta Esperantujo. ■



## ESP-NOVAJOJ

● Dank' al la klopodo de la Wugang-a E-Asocio de Henan-provinco, Ĉinio, la registaro de Wugang planis fondi Henan-an E-kolegion, kies prepara grupo jam stariĝis. Dank' al la subteno de la registaro, multe progresis la loka E-movado.

(Guo Minchang)

● La 16-18-an de aŭgusto 1996 la Ĉina Junulara E-Asocio okazigos la someran tendumon de junaj esperantistoj en la urbo Kunshan, Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco, najbare de Ŝanhajo, kongresurbo de la Unua Azia Kongreso de Esperanto.

(Yin Qin)

● Respektive en la 4-a kaj la 8-a de februaro 1996 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis la poŝtmarkoseriojn "La 3-a Azia Vintra Sportkunveno" kaj "Funkcias Submara Fotokabla Sistemo inter Ĉinio kaj Koreio". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisijaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linfuj).



La memoriga poŝtstampo en la ĉina lingvo kaj Esperanto

● De la 6-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1996 okazos en Okayama, Japanio, la 15-a Komuna Seminario de ĉinaj, japanaj kaj koreaj junaj

esperantistoj kun la temo: "El-haŭtiĝu, Krokodiloj!"

● En Argentino — Venado Tuerto — kiel en ĉiu somera januaro, sub forta varmo okazis dusemajna kurso de Esperanto (10-taga). Instruis Enrique Kohei kaj Marta Solis.

(Marta Susana Solis)



En E-kurso okazigita en Venado Tuerto, Argentino

● Pli ol cent personoj kolektiĝis por celebri la Novan Jaron laŭ la ĉina luna kalendaro, okaze de la novjara ekspozicio de ĉinaj papertranĉaĵoj, la 14-an de februaro 1996, en Kroatio. Ĉina ambasadoro Xie Xieqin malfermis la ekspozicion. La ĉefa organizanto estis Esperanto-Societo "Bude Borjan" el Zagreb kaj unua elementa lernejo de Petrinja. Per la ekspozicio esperantistoj atentigis la urbanojn pri siaj klopodoj helpi al reconstruo de la urbo kaj revenigo de Esperanto al ĝi.

(Spomenka Ŝtimec)

● Aŭguste-septembre 1996 samarkandaj esperantistoj okazigos la internaciajn letervesperojn, dediĉitajn al la 660-jariĝo de la elstara kaj mondfama antaŭulo Amir Timur kaj al la 5-a datreveno de sendependiĝo de Respubliko Uzbekistano. Tiutemaj materialoj (salutleteroj, reĥoj, fotoj, nacilingvaj presaĵoj ktp) estas ege bonvenaj. La plej interesajn kontribuojn la samarkandaj esperantistoj publikigos en sia loka/landa gazetaro, radio kaj televido. Al ĉiuj kontribuintoj ili sendos

dankleteron kun bildkartoj pri antikvaj vidindaĵoj de Samarkando. Bonvolu adresi ĉion jam nun al: Esperanto klubo, Pk 76, UZ-703000 Samarkand, Respubliko Uzbekistano.

(Anatoli Ionesov)

● Ekde la 1-a de februaro 1996 propagandis CZ poŝto la 81-an UK, okazontan ĉi-jare en la ĉefurbo Prago, ĉe poŝtofiĉejo Straznice, distr. Hodonin, per porokaza afrankmaŝinstampilo kun teksto en la ĉeĥa: "81-a Universala Kongreso de Esperanto Prago 20.-27. 7. 1996". La LKK preparas ankaŭ E-lingvan afrankmaŝinstampilon kaj porokazan E-glumarkon. Pluajn informojn pri kongresaj E-filatelaĵoj petu rekte ĉe: Esperanto, Poŝtkesto 36, CZ-696 62 Straznice, Ĉeĥio.

(Vlada Hasala)



La stampo por la 81-a Universala Kongreso de Esperanto

● ESPERANTO, unu el la plej novaj E-organizaĵoj en Serbio (JU), atendas el la tuta mondo esperantaĵojn por varbi novajn geadeptojn al nia kara kaj dolĉa lingvo. Viaj sendaĵoj konvinkos, ke Esperanto multe utilas kaj geesperantistoj meritas la plej grandan valoron. Antaŭdankon al ĉiuj gesendontoj. ESPERANTO, 11307 Bolec, Post. Fako 5, Serbio, Jugoslavio.

(ESPERANTO)

# Azeno en leona felo

(Fablo)

de SANELA ZAKIC (Jugoslavio)



**E**STAS enuo por iu azeno ĉiam porti ŝarĝaĵon. Pro tio uzis la azeno leonan felon kaj envolvigis en ĝin. Ĉiuj bestoj, kiuj vidis la maskitan azenon, ektimis kaj forkuris.


Paŝtistoj prenis pafilojn kaj eliris en kampon por vidi, kia tento dispelis iliajn bestojn. La azeno kuragiĝis kaj komencis bleki.

La paŝtistoj rimarkis leonan felon, sed azenan voĉon. Kiam ili ekvidis la azenajn orelojn sub la leona felo, ili divenis la ruzecon. Ili forĵetis la pafilojn kaj, preninte grandajn stangojn, komencis bati la malbonan azenon.

# Lupo kaj ŝafidoj

(Fablo)

de SANELA ZAKIC (Jugoslavio)



**E**STIS iu lupo, kiu estis tre malsata, sed povis nenion kapti por manĝo. En la proksimeco estis plenkorto da ŝafidoj. La lupo neniel povis eniri en la korton. Tial al ĝi restis nur voki la ŝafidojn.

“Ŝafidoj, ŝafidoj, miaj karaj amikoj. Helpu min. Osto enpinĉiĝis en mian gorgon. Venu kaj elprenu la oston el mia gorgo.”

La saĝaj ŝafidoj respondis al la lupo:

“Ni irus, se la pordego estus malfermita. Nu ni vokos paŝtistojn, ĉar ili tre bone scias, kiel elpreni la oston el via gorgo.”

## Senkaŭza timo

(Antikva ĉina fablo)

Yue Guang iam havis intiman gaston, kiu por longa tempo ne vizitis lin post la lastfoja renkontiĝo. Yue Guang demandis lin pri la kialo. La gasto respondis: “Trinkante en via hejmo lastfoje, mi trovis serpenteton en mia taso, kio min naŭzis. Poste mi serioze malsaniĝis.” Yue Guang rememoris, ke en la hejmo estis pafarko pendanta sur la muro, kaj kolora serpenteto estis pentrita sur la pafarko. Do, li invitis la gaston al la sama sidloko ĉe la sama tablo kaj demandis lin: “Ĉu vi vidas nun la serpenton, kiun vi rimarkis lastfoje?” La gasto respondis: “Jes, tute sama kiel la lasta.” Yue Guang diris al li la veron. La gasto tion ekkonsciis kaj tuj resaniĝis.



Xie Jun kaj ŝiaj subtenantoj

QI LIN:

## Xie Jun, eksreĝino de monda virina ŝakludo

**N**OVEMBRE de 1991, ĉina ŝakludistino Xie Jun (Ŝje Ĝjun) fariĝis ĉampionino de la monda virina ŝakludo. Du jarojn poste, ŝi venkis en la konkurso por defendi la titolon.

Sed en 1996 Xie Jun estis venkita de hungara rivalo Zsuzsa Polgar per 4.5:8.5 en la Monda Ĉampioneca Konkurso de Virina Ŝakludo, en Jaen de Hispanio, kaj perdis la titolon reĝino de monda virina ŝakludo.

Kiel atendite, la konkurso iris inter egalfortaj rivaloj. Zsuzsa Polgar naskiĝis en familio de ŝakludistoj kaj gajnis la titolon de monda majstrino de ŝakludo en la aĝo de 14 jaroj. Nun ŝi kulminas en arto de ŝakludo. En 1992, kiam okazis konkurso por elekti defianton de Xie Jun partoprenontan en la Monda Ĉampioneca Konkurso de Virina Ŝakludo en 1993, ŝi kaj ŝia rivalo plurfoje egaligis la partiojn kaj fine oni decidis la rezulton de la konkurso per lotado, tiel ke ŝi perdis la ŝancon defii Xie Jun. Marte de 1995 ŝi refoje partoprenis en tiuspeca konkurso kaj per absoluta supereco venkis mondan eksĉampioninon Maya Chiburdanidze el Gruzio. Por venki Xie Jun ŝi kaj ŝia cerbaro el membroj de Polgar-familio kaj aliaj faris plenan esploron pri la ludarto de Xie Jun. Samtempe

kun tio, Ye Jiangchuan (Je Ĝjangĉuan), la ĉeftrejnistino de Xie Jun, kaj aliaj laborantoj kolektis multajn materialojn pri Zsuzsa Polgar. Ĉiutage Xie Jun ricevis pli-ol-10-horan trejnadon. Kaj plie, la Ĉina Kabineto de Ŝakludistoj aranĝis por ŝi prepar-konkurson. Por sin fortikigi ŝi ellernis naĝi. Oni povas diri, ke ŝi kun plena memfido partoprenis en la konkurso por defendi la titolon.

Efektive ŝi gajnis la unuan partion. Je la 15-a de la 30-a januare komenciĝis la partio. Zsuzsa Polgar faris la unuan movon anormalan por trompi Xie Jun. Trovinte, ke la rivalo timas antikva-hindan defendon, Xie Jun multfoje variigis sian movon. Ĉe la 60-a movo Zsuzsa Polgar vidis la ĝeneralan tendencon kaj diris: "Mi perdis la partion."

Sekvis egaligo en la dua kaj tria partioj. Pro tio s-ro Luis Reutero Suarez, reprezentanto de la Konkursa Teknika Komitato, decidis puni ilin ambaŭ je 25 000 usonaj dolaroj respektive, kun la motivo, ke la du partioj malesperigis la rigardantojn kaj ke ili venis tien por ferii. Kelkajn tagojn poste, li nuligis sian decidon kaj pardonpetis de ili, tamen tio havis negativan influon sur ambaŭ ŝakludistinojn, precipe sur Xie Jun. Ĉi tiu perdis la kvaran kaj kvinan partiojn kaj egaligis la sesan. En la oka partio

ŝi ege peneme ludis pli ol kvin horojn, kion laŭdis la rigardantoj. En la konkurso de la unuaj ok partioj Xie Jun gajnis sume 2.5 poentojn. Restis al ŝi tre malgranda ebleco defendi la titolon reĝino de la monda virina ŝakludo. Bedaŭrinde, en la sekvan-taj kvin partioj ŝi gajnis nur la 12-an kaj Zsuzsa Polgar fariĝis nova monda ĉampionino de virina ŝakludo.

La konkurso finiĝis per la 13-a partio, laŭ la difino oni devis ludi 16 partiojn. Intervjuate, Xie Jun diris: "Mi jam faris ĉion eblan en la konkurso." Laŭ analizo far la ĉina ŝakludista rondo, la ĉefaj kaŭzoj de la malsukceso estis jene: A. Zsuzsa Polgar estis iom pli forta ol Xie Jun en ludarto. B. Prepar-nivelo por la konkurso de Xie Jun estis malpli alta ol tiu de la rivalo. C. Sintezo stato de Xie Jun estis malpli bona ol tiu de la rivalo. Ĉ. Cerbaro de la rivalo estis forta. D. Aliaj faktoroj. Ĝenerale, estas granda la distanco de nivelo inter la ĉinaj kaj alilandaj ŝakludistoj. Inter la pli ol 10 000 ŝakludistoj anoncitaj de la Internacia Ŝaka Federacio laŭ ilia gradpoentaro estis nur 68 ĉinaj, kaj plie ankaŭ estas granda la gradpoenta diferenco inter la ĉinaj kaj alilandaj ŝakludistoj.


Xie Jun ne deprimiĝis, sed bone ĉerpis lecionon el la konkurso por plialtigi sian ludarton kaj regajni la titolon. ■



# Tangshan restariĝis

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de ZHAO XI



**E**BLE iuj legantoj ne forgesis la tertremon en Tangshan, okazintan la 28-an de julio 1976. En palpebruma daŭro la industria urbo centjara kun miliono da loĝantoj estis detruita. La

katastrofo forrabis la vivon de 240 000 homoj kaj serioze vundis 160 000 homojn. Tiam alilandanoj opiniis Tangshan malaperinta for de la mapo. Nia revuo EPC raportis pri la tertremo kaj pri rekonstruo de la urbo en la sekvantaj 20

jaroj. Hodiaŭ, kiam mi revizitis la urbon, mi vidis ĝin tute nova.

## FORTIKIGI LA NOVAN TANGSHAN


La nova Tangshan, restariĝinta el ruino, havas areon je 40% pli grandan ol la antaŭa (66 kvadrataj kilometroj). Ĝi konsistas el 3 partoj:

La centra distrikto baziĝas sur industrioj de ŝtalo, karbo, elektro, porcelanaĵoj kaj konstruaj materialoj. Tie troviĝas la Tangshan-a Ŝtala Kompanio, unu el la 10 grandaj ŝtalaj entreprenoj de Ĉinio; la Tangshan-a Ĝenerala Elektrejo, grava por Pekino, Tianjin (Tjanĝin) kaj Tangshan; porcelanaĵaj fabrikoj kun jara produktopovo de 350 milionoj da porcelanaĵoj por ĉiutaga bezono. En la norda kaj orienta partoj de tiu distrikto estas vicoj da fabrikoj, en la okcidenta kaj centra partoj estas movoplenaj loĝkvartaloj kun magazenoj, lernejoj, parkoj, hospitaloj, hoteloj, sporthaloj, teatroj ktp.

La nova distrikto prenas maŝinan kaj tekstilan industriojn kiel la ĉefajn, tie troviĝas la fama Orient-

Yang Yu kaj lia edzino





En kemifibra tekstilejo

Kontrolo de la porcelanaĵa  
kvalito Foto de ZHOU LIPING







Tangshan hodiaŭ  
Foto de **ZHOU LIPING**



En magazeno

Foto de **ZHOU LIPING**

Nova konstruejo en la Orient-  
Hebei-a Cementa Fabriko





Hebei-a Cementa Fabriko. Kiam mi vizitis la fabrikon, de malproksime mi vidis viaduktan transportlinion 9.8 km longan, kiu kondukas al la antaŭhejta turo 80 m alta kaj la cementa kaverno 74 m longa.

La orient-mineja distrikto baziĝas sur 5 karbominejoj, kiuj apartenas al la Kailuan-a Mineja Entreprenejo, la plej granda en Ĉinio por produkti porkoaksigitan karbon.

Tiuj 3 distriktoj distancas 25 kilometrojn unu de alia. Inter ili estas fervojoj kaj ŝoseoj.

Oni racie konstruis en Tangshan fabrikojn kaj loĝdomojn povantajn elteni 8-gradan tertremon. Estas direble, ke la nova Tangshan estas pli fortika kaj oportuna ol la malnova antaŭ la tertremo. Ĝuste pro tio, en 1990 UN honoris la urbon per premio "Eminenta Kontribuo al Homa Loĝado".

## POSTVIVANTOJ

Dum vizitado mi trovis, ke ĉiuj postvivantoj menciis la katastrofon kvazaŭ hieraŭ okazintan.

"Tiun frumatenton, en profunda dormo mi ŝajne estis subite ĵetita en kribrilon senĉese skuigantan. Antaŭ vekigo mi perdis la konscion," la 52-jara Yang Yu rakontis al mi. Kiam oni savis lin serioze vunditan el brikrompaĵoj, por eterne forlasis lin liaj gepatroj, edzino kaj du filoj. Li montris al mi fotojn trovitajn sub la ruino, sur kiuj estas liaj familianoj.

Li, kun radianta vizaĝo, estas iom pli grasa ol sur la fotoj. La sufero de la tertremo paliĝis, li aspektas tre forta kaj sana. Dekkelkajn jarojn antaŭe, li reedziĝis kaj havas novan feliĉan familion. De infanaĝo li amas muzikon, iam lernis komponadon en mezlernejo dependa de konservatorio. Kvankam poste li laboris kiel karboministo 17 jarojn, tamen liaj travivaĵoj kaj precipe la doloro kaŭzita de la tertremo elvokis lian verkan inspiron. Li komponis pli ol 130 verkojn, kiaj "Bolanta minejo", "Kanto pri Jingtang-haveno" kaj "Tangshan,

fenikso revivinta el fajro", el kiuj kelkdekaj gajnis premiojn en-kaj eksterlande.

Mi vizitis ankaŭ Dang Yuxin (Dang Juŝin), alian postvivanton.

La tagon, kiam okazis la tragedio, ŝi orfiĝis en sia 6-a monato. Tiam neniu konis ŝin. En Yuhonglernejo de Shijiazhuang (Ŝiĝjaĝŭang), Hebei-provinco, kiu fondiĝis speciale por orfoj, iu instruisto donis al ŝi tiun nomon.



Dang Yuxin en laboro

La 20-jara Dang Yuxin, vigla kiel infano, diris al mi, ke la tertremo orfigis 4 000 infanojn. Tiujare la ŝtato starigis pororfajn lernejojn Yuhong por vivteni kaj klerigi ĉ. milon da orfoj. La restaj estis vivtenataj de siaj parencoj aŭ laborejo, en kiu ilia patro aŭ patrino laboris antaŭ sia morto. Nun tiuj orfoj maturiĝis. 98% de ili ricevis edukadon minimume de mal-supera mezlernejo. La registaro de Tangshan emfazis, ke oni enoficigu, antaŭ ĉio, orfojn.

Jam en infanaĝo Dang Yuxin deziris fariĝi kuracistino. Nun ŝia deziro realiĝis. Post diplomigo el mezlernejo ŝi eklaboris en la Tangshan-a Laborista Hospitalo. Evidente ŝi kontentas pri sia okupo.

## JINGTANG-HAVENO EN KONSTRUADO

Tangshan estas industria urbo

kun abundaj riĉfontoj. Post la tertremo ĝiaj rekonstruado kaj evoluado en du jardekoj ne nur revivigis ĝian ekonomion, sed ankaŭ montris bonan tendencon de ĝia plia evoluado. Precipe post kiam la ŝtato faris la projekton "Plirapidigi la Ekonomian Disvolvigon de la Regiono ĉirkaŭ Bohai-marŝo", Tangshan, sidanta centre de la menciita regiono, ekhavis bonan ŝancon por sia plia progreso.

Jingtang-haveno estas ĝojiga ekzemplo. Ĝi proksimas al Nanpŭsalejo, la plej granda en Azio. Kelkajn jarojn antaŭe, ĝi akceptis min kiel malgranda fiŝista vilaĝo. En 1989 komenciĝis konstruo de la haveno kaj poste ekfunkciis fervojoj kaj ŝoseoj, starigis domegoj de la havena administracio kaj komerca kontrolado, konstruiĝis 8 ankrejoj, kun jara en-kaj elŝipiga povo de 3 milionoj da tunoj, kaj malfermiĝis la internaciaj navigilnjoj.

Direktoro de la havena administracio Tian Xiuqi (Tjan Ŝiuĉji), diris al mi, ke Jingtang-haveno dorse sin apogas al la Nordo, Nordoriento kaj Nordokcidento de Ĉinio, havas marbordon 6-kilometre longan kun akvo profunda kaj bordo kruta. La maro 1.5 kilometrojn for de la bordo estas 5 m profunda, tie la akvo ne malkvietas, ne ŝlimas nek glaciigas en la tuta jaro. La loko taŭgas por konstrui ĉefan havenon de norda Ĉinio.

Plie, najbare al Pekino kaj Tianjin, fronte al Bohai-marŝo, Tangshan posedas avantaĝajn geografiajn kondiĉojn por altiri alilandajn investantojn. Entreprenistoj el pli ol 30 landoj kaj regionoj jam investis 400 milionojn da usonaj dolaroj por starigi entreprenojn, inkluzive de la Tangshan-a Zhonghong-a Limigita Kompanio de Vianddonaj Kokoj.

Videble, la terura tertremo ne fortimigis alilandajn investantojn. La Tangshan-anoj elkore deziras, ke plu aperu nenia katastrofo. ■

# En ŝtona urbeto

Teksto de SUN AIJUN  
Fotografioj de LIU SIGONG



**F**RUMATENE, kiam ankoraŭ ne malfermiĝis butikoj de la antikva urbeto Chongwu, sur mallarĝa ŝtonplata strato virinoj estis vektoportantaj grandajn korbojn. Ili venis de vilaĝoj kelkajn km. de la foirejo. Ili ĉiuj, en mallonga blua vesto kun mallarĝaj manikoj kaj nigra pantalone el silko, portis surkape flavan bambuan ĉapelon kun pinta supro kaj floran kaptukon, argentan ĉenon ĉe la talio kaj pantoflojn sur nudaj piedoj. Ili estis virinoj de Hui'an.

La movoplena foirejo estis granda kiel futbalejo. Tie staris vicoj da korboj, en kiuj plejparte estis fiŝoj, konkuloj kaj aliaj marproduktoj ĵus kaptitaj sur maro, arakido, batato, fruktoj kaj aliaj montregionaj produktoj. Preskaŭ apud ĉiu dua korbo staris unu virino kun flora kaptuko. Sur la sunbruna vizaĝo de tiaj virinoj oni povis legi ilian penlaboron, sed malfacile diveni ilian aĝon. Mi haltis antaŭ korbo plena de marproduktaĵoj, kaj tuj la vendistino afable alparolis min en dialekto, kiun mi tute ne kompren-

is. Mi nur manneis kun rideto. La tieaj junulinoj plejparte portas kaptukon kun buntaj brodaĵoj, dum maljunulinoj pimpajn silkajn florojn sur la grizaj haroj ĉe la tempioj kaj argentan ĉenon ĉe la talio. Pasumante inter homoj kaj korboj en la foirejo, mi vidis ĉie florajn kaptukojn kaj aŭdis ĉie dialekton nekompreneblan, kvazaŭ mi estus en fremda lando.

La urbeto Chongwu troviĝas sur duoninsulo kun areo de 19.6 kvadrataj kilometroj, oriente de Hui'an-gubernio, Fujian-(Fuĝjan)-provinco. La urbeto posedas 12 vilaĝojn, el kiuj 7 konservas unikajn tradiciajn morojn, kies ĉefa trajto montriĝas en la virinoj de Hui'an. Ili ne estas nacimalplimultanoj. Nur pro la specialaj vivkondiĉoj ili tiamaniere sin vestis. En Chongwu kaj Hui'an multaj viroj kaj kaptas fiŝojn sur maro kaj laboras aliloke, dum virinoj, kiuj scipovas mas-trumadon ekde sia juna aĝo, faras kamplaboron kaj transportadon, sejni kaj kolekti konkulojn. Tial ili portas bambuan ĉapelon kaj kaptukon por ŝirmi kontraŭ vento

kaj suno, mallongan veston kaj pantalonon kun larĝaj krurumoj oportunajn por labori. Chongwu estas tiel bela kun lazura ĉielo, smeralda maro, flava plaĝo kaj verdaj arboj, ke ĝiaj junulinoj bone scias, kiel sin plibeligi. Do naskiĝis flava bambua ĉapelo, flora kaptuko, mallonga blua vesto kaj nigra silka pantalone en unika stilo.

Posttagmeze mi veturis per motortriciklo al fiŝista vilaĝo, kie loĝas virinoj de Hui'an. La kondukisto estis junulino beleta kun flora kaptuko surkape, en moda jako. Ŝi nomiĝas Guiyin (Gujjin). Ŝi bone parolis en la komuna ĉina lingvo. Survoje ŝi informis al mi, ke la tieaj junulinoj en la aĝo de ĉ. 20 jaroj ĉiuj estis klerigitaj kaj ŝatas modajn vestojn. Malmultaj tradicie sin vestis. Antaŭe la vilaĝaninoj pene laboris tutjare kaj vivis mizeran vivon. Nun ili iom post iom forigis la rutinajn konceptojn, pli kaj pli multaj el ili entreprenis komercadon en la foirejo aŭ okupiĝis pri transportado.

Ĉe la fiŝista vilaĝo mi vidis nur kelkajn fiŝboatojn sur plaĝo, ĉar



estis morta sezono de fiŝkaptado. Mi rimarkis survoje, ke en la urbeto Chongwu ĉie estas ŝtonoj. Preskaŭ ĉiuj loĝdomoj estis konstruitaj el ŝtonoj. Ĉio estis farita el ŝtono: tabloj kaj benkoj en kortoj, necesejoj, porkaj staloj, stratoj kaj eĉ fostoĵoj por elektraĵoj... Mi vizitis prilaborejon de ŝtonaj skulptaĵoj. Tie mi vidis, ke oni skulptas sur diversformaj ŝtonoj vivoverajn drakojn, feniksojn, florojn, birdojn, leonojn, bodisatvojn ktp. Lokano diris al mi, ke la ŝtonoj de Chongwu havas apartan kvaliton. Eĉ konstruaĵoj de Pekino estas el ŝtonoj de Chongwu. Krom fiŝkaptado, ankaŭ haki ŝtonojn en monto estas de antikve ĉefaj vivrimedoj por Chongwu-anoj. En la lastaj jaroj pli ol cent prilaborejoj de ŝtonaj skulptaĵoj starigis en la urbeto kaj iliaj skulptaĵoj vendiĝis alilande. Saĝaj kaj laboremaj Chongwu-anoj riĉiĝis, tamen ili ankoraŭ konstruis el ŝtonoj loĝdomojn pli kaj pli altajn kaj belajn.


Vesperigis, kiam mi vizitis la malnovan urbeton de Chongwu ĉe marbordo. De malproksime mi vidis urbomuron impone starantan en krepusko kiel serpentanta drako. Dum la pasintaj 600 jaroj la ŝtona urbomuro ne estis difektita de vento kaj pluvo. Ĝi, 2 455 m longa kaj 7 m alta, konstruita en la 14-15-a jc., estas la plej bone konservita T-forma ŝtona urbomuro en Ĉinio. Oriente de la duoninsulo Chongwu etendiĝas vasta maro. Oni konstruis la urbomuron por defendi la urbeton kontraŭ alilandaj agresantoj. Ascendante la muron, mi imagis militan scenon antaŭ 600 jaroj. Rigardante malsupren, mi trovis la maron en krepusko pli mistera. En la urbeto brilis lamplumo el la fenestroj de ŝtonaj etaĝdomoj, kio retiris min de la meditado pri la antikva milito al la reala vivo en paco.

Promenante sur mallarĝa strato, mi flaris apetitivekan odoron de markreskaĵoj ŝvebantan el la kuirejoj de familioj. ■



En fiŝbazaro

Junulino en bela vesto



Ili atendas revenon de sia familiano de fiŝado.




Maljunulino kun kapornamo



Virinoj atendantaj siajn fiŝkaptantajn edzojn.





Flegado

MIA VIVO

## Kiel mi laboras en zoo?

de ZHANG JING

**P**OST kiam mia ĉimpanzido Yangyang (Jangjang) komencis vivi en la dresejo, mi ofte sopiris pri ĝi. De tempo al tempo mi vizitis ĝin. Ĉiufoje, kiam mi etendis al ĝi la manon tra la ferkrada pordo, ĝi unue rigardis min de malproksime kaj poste malrapide alproksimiĝis al la pordo. Post momenta hezitado ĝi etendis al mi la manon. Tenante ĝian malgrandan manon, mi demandis ĝin, ĉu ĝi rekonis min kaj ĉu ĝi jam alkutiĝis al la vivo en la dresejo. Ĝi fikse rigardis min, kvazaŭ min komprenante.

La 29-an de januaro 1995 Yangyang naskiĝis en la Pekina Zoologia Ĝardeno, kun korpopezo de 2.04 kg. Akuŝinte ĝin, la patrino lasis ĝin sur malvarma planko kaj eĉ ne ĵetis rigardon al ĝi. Tiam Yangyang estis malgranda, senhara kaj tremis de frosto. Pro tio oni decidis, ke mi bredu ĝin anstataŭ ĝia patrino.

La vivokutimo de la ĉimpanzo similas al tiu de la homo. Do, mi traktis ĝin kiel bebon. Tiam mi ĵus edziniĝis kaj ne lertis en flegado kiel patrino. Kiam mi unuafoje tuŝis Yangyang, mi tre timis dolorigi ĝin. En la unuaj monatoj mi ofte biciklis en frosta vento al grandaj hospitaloj por kolekti laktan, kiun memvole oferis akuŝintinoj. Ĉiutage mi zorgeme nutris

ĝin per homa lakto miksitita kun pulvoro de bovina lakto, vitaminoj, fiŝoleo, kalcia pulvoro, ovo-flavo k.a. Post tio mi frapetis al ĝi la dorson kiel al bebo per la mano por ruktigi ĝin.

Ĉiutage mi flegis la ĉimpanzidon, mezuris ĝian temperaturon, purigis la ĉambron, ŝanĝis por ĝi vestojn kaj ludis kun ĝi. Kiam ĝi dormis, mi devis fari detalajn notojn pri ĝi, purigi kaj desinfekti ĝiajn manĝilojn kaj vestojn, prepari manĝaĵon por ĝi ktp. Kiam ĝi havis du monatojn, mi helpis al ĝi turni sin; en serena tago mi portis ĝin elen por sunbano; kiam ĝi malsaniĝis, mi donis al ĝi medikamentojn kaj faris al ĝi injektadon.

Dum ĉ. unu jaro mi dediĉis multan tempon al la ĉimpanzido. Ĝi estis komprenema. Aŭdinte miajn paŝojn, ĝi ĝoje kriis kaj ofte rekompencis min per kisoj. Ĝi el-lernis fari diversajn ludojn.

Decembre de 1995, ĝia korpopezo atingis pli ol 10 kg. Ĝi kreskis pli rapide ol bebo kaj ne plu bezonis mian nutrandon. Mi devis lasi ĝin vivi en la dresejo. Ĝi bone vivis tie kaj post tri monatoj ĝi multe pli grandiĝis ol antaŭe.

Post diplomigo el universitato en 1990 mi eklaboris en la Pekina Zoologia Ĝardeno. Tie mi bredis leonojn, tigrojn, pandojn, ĉimpanzojn kaj birdojn. Mi ŝatas ĉiujn bestojn, ĉu rabajn ĉu obeemajn, des pli la sovaĝajn, kiaj arktaj ursoj kaj aliaj, kiuj povas

plene montri sian naturecon.

Mi havas apartan amon al ĉimpanzo. En 1992, kiam mi bredis ĉimpanzon Lulu, mi konatigis kun bredisto en la ĝardeno. Pro komuna ŝato ni geedziĝis nelonge poste.

Post kiam Yangyang eniris en la dresejon, mi rekomencis laboron por reprodukti pelikanojn, blankajn cikoniojn kaj ibisojn. Estas multe pli malfacile kompreni birdon ol ĉimpanzon. Birdobredado bezonas teknikan lertecon, zorgemon kaj paciencon. Virinoj taŭgas por la laboro ĝenerale. Ĉiutage mi boatas al la insuleto meze de la lago, sur kiu loĝas birdoj, kaj donas al ili fiŝetojn, panpecojn kaj aliajn manĝaĵojn. Poste mi observas ilin, sidante sur seĝo, foje pli ol du horojn. Pro kio gruo dancas? Por kio birdoj pretas flugi? Al kiu cikoniino la vircikonio kantas? Ĉion tion mi penas kompreni.

Tuj demandis min, ĉu mi sentis min soleca kaj la laboron monotona. Mi respondis, ke mi trovis neelĉerpeblan ĝuon el mia laboro. Kun bestoj oni sentas sin trankvila ĉiam. Kiam oni ĉagreniĝas kaj sidas borde de la lago, de malproksime rigardante brilantaj en la suno la plumojn de nigraj cikonioj kun ruĝaj beko kaj okuloj, kaj libere naĝantaj en la akvo la blankajn cigojn kun kapo levita, la ĉagreno nerimarkeble malaperas. Mi certas, ke mi laboros en la zoologia ĝardeno dum mia tuta vivo. ■

ZHANG YUSHAN:

## Prezentado sur subportilo

**T**IO estas mirinda popolaro prezentata nur de Qugou(Ĉjugoŭ)-vilaĝanoj, vivantaj en norda parto de Henan-provinco, Ĉinio.

Laŭdire, antaŭ pli ol 2 000 jaroj, en Qugou okazis kruela batalo. Oni ŝakale batis unuj la aliajn per armiloj. Pro tio oni nomis la lokon Armila Vilaĝo. Poste, granda edukisto Konfuceo, vojaĝante tra multaj regnoj, pasloĝis en la vilaĝo, kies nomo malplaĉis al li. Ankaŭ la vilaĝanoj ne ŝatis tiun nomon. Ili petis Konfuceon ŝanĝi la nomon de la vilaĝo. Li ĝoje diris: "Mia hejmloko nomiĝas Qufu kaj la via — Qugou, ĉu bone?" La vilaĝanoj volis prezenti kantadon por danki lin en la sekvanta tago, sed Konfuceo jam foriris. Do, ili surstratigis tablon, metis sur ĝin freŝajn florojn, kaj kantigis sur ĝi knabinon, kiu kantis plej bone en la vilaĝo. Sur tiu tablo la knabino kantis en irado aludante adiaŭi la majstron. Eble tio estis la plej frua prezentado sur subportilo. Ekde tiam tio fariĝis unu el la amuzaj aktivadoj por qugou-anoj en festaj tagoj.

Hodiaŭ, tio jam fariĝis arta prezentado kombinita teatron kun akrobataĵo sur subportilo. Plenkreskuloj piediras, tenante subportilon 3-5 m. altan, sur kiu infanoj en la aĝo de 3-7 jaroj kantante, faras diversajn movojn. La prezentado temas ĉefe pri mitoj, legendoj kaj historiaj aferoj. Tie mi vidis simi-reĝon, luditan de knabo, kiu staris, sin apogante sur stango. Mi vidis tie ankaŭ la imperiestron Qianlong (Ĉjanlong) el televida filmo. Kun pliboniĝo de la popola vivo, nun la prezentado sur subportilo estas farata ne nur en vilaĝoj, sed ankaŭ en grandaj urboj.

Por infanoj de Qugou fari prezentadon sur subportilo strate ja estas granda ĝuo. La infanoj, kiuj povas ludi sur subportilo, devas esti ne nur fortaj kaj bravaj, sed ankaŭ tre lertaj en akrobataĵo. Ekz., iu infano portas ombrelon sur la subportilo kaj alia rajdas sur unurada ciklo sur la ombrelo. Tian prezentadon ne povas ludi ajna knabo.

La subportiloportantoj estas gravaj en la prezentado. Ili devas firme kunligi la infanojn kun la

subportilo kaj levi ilin supren. Tiu laboro postulas grandan atenton kaj sperton. Ĝenerale tion faras patroj de la infano-aktoroj. Por garantii la sekurecon, ili movis sin ĉiam singardeme. En la prezentado la patroj kaj infanoj kune ĝuis.

Fari prezentadon sur subportilo estas granda plezuro por qugou-anoj. En la tago de prezentado ĉiuj vilaĝanoj eldomiĝas, iuj dancas *janggedancon*, aliaj iras per stilzoj, triaj ludas *surna-on* (unu el la ĉinaj blovinstrumentoj). Tiam tondras ankaŭ tamburoj kaj gongoj,

Ankaŭ koko estis feliĉa. Kiam ĝi aperas sur la subportilo kun infano sur la dorso, oni huras kaj admiras. Fakte ĝi ne estas tiel forta, nur kamuflita de qugou-anoj. Malgraŭ tio ĝi aspektas kiel vera heroo. La koko fiere akceptas bongustajn manĝaĵojn donitajn de vilaĝanoj per longa stango kaj laŭte kokerikas kun solena mieno. ■

Aktorineto antaŭ prezentado



Prezentado sur subportilo






de WANG ENPU



Farado de boato el betula ŝelo




Fiŝkaptado per reto

Heĝe-oj, loĝantaj en la basenoj de la riveroj Heilong, Wusuli kaj Songhua, nordorienta Ĉinio, sin vivtenas per fiŝkaptado. En la riveroj kaj lagoj de la regiono estas multaj valoraj huzoj, trutoj, karpoj, karasoj k.a. Antaŭe heĝe-oj manĝis ĉefe fiŝojn kaj sin vestis per fiŝhaŭto. Ili okupiĝis pri fiŝkaptado preskaŭ en la tuta jaro. Ili sekigis la kaptitajn fiŝojn kaj konservis ilin kiel manĝaĵon por la tuta jaro. Nur en la lastaj jaroj ili ekprenis grenon kiel ĉefmanĝaĵon.

Heĝe-oj kaptas fiŝojn per reto, hoko, boato aŭ forko. Reta fiŝkaptado estas farata de dek personoj inter majo kaj oktobro, kun plej aĝa spertulo kiel gvidanto. La kaptitaj fiŝoj estas egale dividitaj. Hokfiŝado estas farata de du personoj. Ili fiŝas per pli ol 200 (antaŭe 20-30) hokoj kunligitaj. Heĝe-oj fiŝkaptas ankaŭ sur boato per diversaj iloj. Antaŭe ili uzis boaton el betula ŝelo,

kiu estis malpeza kaj rapida, sed ŝanceliĝema, kaj nun ili uzas lignan motorboaton. Fiŝforkado estas farata de unu persono. Heĝe-oj estas tre spertaj kaj neniam maltrafis en tio. Legendoj diras, ke estis paro da geedzoj. La edzo estis lerta en fiŝforkado kaj la edzino lerta en vestokudrado. Komence la edzo forkis fiŝon, truante ĝian haŭton. La edzino diris, ke la vesto farita el truita fiŝhaŭto estas malbela. Poste la edzo ĉiam forkis fiŝojn je la kapo, kaj la edzino kontente diris, ke vesto el tia kompleta fiŝhaŭto estas bela. El tio oni vidas, kiel alta estas la tekniko de fiŝforkado de heĝe-oj.


# de fiŝkaptado



Heĝ-a virino



Farado de vesto el fiŝaŭto



Antaŭ ol sekigi fiŝojn



Antaŭ fiŝkaptado



### ARBOJ — FONTO DE GRENO KAJ OLEO

En la lastaj jaroj la ĉina grenaj kaj olea produktado el arboj stabile disvolviĝis. Nun la areo de grenaj oledonaj arbaroj de Ĉinio atingis 6.7 milionojn da hektaroj. En 1994 la produktokvanto de arbodevena greno atingis 1.83 miliardojn da kilogramoj. Laŭ varmovaloro tiu sumo egalas al 1.23 miliardoj da kilogramoj da ordinara greno. La produktokvanto de arbodevena oleo atingis 160 milionojn da kilogramoj, egale al 800 milionoj da kilogramoj da sojfaboj. Eksploati la fonton de arbodevena greno kaj oleo por produkti grenan surrogaton estas nova vojo por pliprodukti grenon.

En Ĉinio estas pli ol 100 specoj da utiligeblaj grenonaj arboj. Inter ili pli ol 90 specoj havas 20% da enteno de amelo. Kaŝtanoj, jujuboj, persimonoj kaj aliaj havas tre altan nutran kaj ekonomian valoron. En Ĉinio kreskas pli ol 200 specoj da oledonaj arboj. La olea enteno de olekamelio, abrikoto, migdalo, zantoksilo (*Zanthoxylum*), samaro kaj aliaj estas tre alta. La olea enteno de nektarino de Xinjiang (Ŝingĵang) atingis 79%, multe pli alte ol tiu de arakido kaj sezamo.

Eksploatao de la fonto de arbodevena greno ne nur pliriĉigas grenajn specojn, sed ankaŭ liveras gravajn krudmaterialojn por prilabori altklasajn manĝaĵojn. Laŭ antaŭkalkulo, en la fino de la kuranta jarcento Ĉinio bezonos 4 miliardojn da kilogramoj da kaŝtanoj, jujuboj kaj persimonoj, tamen nun ilia jara produktokvanto estas nur miliardo da kilogramoj. Tio tute ne povas kontentigi la bezonon de la socio.

Nun proksimume 10% da ĉinaj agroj estas uzataj por produkti manĝeblan oleon. Se ni produktos ĝin el pli da arboj, ni do povos uzi pli da agroj por grenaj produktado. Laŭ plano de la ĉina forstokultura departemento, en la lastaj 5 jaroj de la kuranta jarcento Ĉinio konstruos produktajn bazlokojn kun

oledonaj arboj kiel la ĉefaj en la regiono sude de Yangzi-rivero kaj tiujn kun grenonaj arboj kiel la ĉefaj en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero.

### ĈINAJ GONGOJ

Gongo estas nacia latuna perkutinstrumento ŝatata de la ĉina popolo. En la antikveco ĝi estis uzata en rito kaj milito, sekve cirkulas eĉ nun la diraĵoj sonorigi gongon por liberigi la vojon kaj sonorigi gongon por fini la batalon. Antaŭ nelonge en Guangxi (Gŭangŝji) elteriĝis gongo farita pli ol 100 jarojn antaŭ la Kristo. Ĝi estas la plej frua gongo laŭ nia sciado. De la dinastio Song (960-1279) gongo estis vaste uzata en Ĉinio. En 1791 franca komponisto Gossec komencis uzi ĉinan gongon en orkestro. Ekde tiam gongo estis oficiale uzata de orkestro. Oni honore nomas ĝin ĉina gongo.

La ĉina gongo sonas obtuze kaj majeste. La disko de la gongo estas granda, sekve granda estas ankaŭ la variado de ĝia sonvolumeno. Perkutate, ĝi donas sonon inertan kun longa resonado. Ĝenerale, ĉe unuopa, malrapida, malforta aŭ mezforta perkutado ĝi donas plej bonan efekton. Orkestro ofte uzas ĝin por fortigi la rolon suferplenan kaj tragedian. Ĝi estas malofte uzata en kunludo, tamen sufiĉas nur kelkaj frapoj por plene priskribi ĝian muzikan rolon. En la lastaj jaroj oni prenis ĝin kiel altvaloran donacon kaj donacis ĝin al artistaj grupoj de aliaj landoj, kiuj vizitis Ĉinion.

La ĉinaj gongoj, plejparte latunaj kaj rondaj, havas malsamajn nomojn pro malsamaj grandecoj, formoj, tembroj kaj efektoj. Iuj kun konvekso mezo donas sonon obtuzan, aliaj el pluraj gongetoj malsamdikaj kaj donantaj diversajn sonojn taŭgas por diversmelodia ludado. Estas ankaŭ kompleto da gongoj grandaj kaj malgrandaj kun malsamaj tembroj. Ofte uziĝas gongoj granda, mezgranda kaj malgranda.

# Vojaĝo en Tianshui

Teksto de **BING CHUAN**

Fotoj de **HAN HONG**

**L**A Silka Vojo ne estis absolute fiksita. Ĝi ŝanĝiĝis plurfoje en kelkaj partoj pro diversaj kaŭzoj, kiaj sezona alterno kaj milita tumulto. Inter Xi'an (Ŝji'an) kaj Lanzhou iam estis 3 linioj, unu el kiuj trapasis Baoji (Baŭĝji), mezgrandan industriaran urbon de Shaanxi (Ŝenŝji), kaj Tianshui (Tjanŝuj). De la 1-a ĝis la 12-a jarcento ĝi estis la plej mallonga vojo inter la provincoj Shaanxi kaj Gansu. Siatempe la eminenta bonzo Xuanzang (Ŝjŭanzang) de Tang-dinastio prenis tiun ĉi linion por pilgrimi al Hindio. Ĉi-foje ankaŭ mi vojaĝis laŭ tiu vojo.

## FERVOJO, ŜOSEO KAJ MODERNA AŬTOVOJO


Ĉe la limo inter la provincoj Shaanxi kaj Gansu kuŝas Longshan-monto. Pro tio la loko estas dividita en la partojn Longxi (Longŝji, okcidente de Longshan-monto), Longdong (oriente de ĝi), Longzhong (meze de ĝi) kaj Longnan (sude de ĝi). Forlasinte Baoji, nia trajno suriris Longxi-altebenaĵon. La monotona flavo de la altebenaĵo impresis min per grava historia ŝanĝiĝo. Ĉe la montopiedo la zigzaga Flava Rivero fluas orienten. Sur la montodeklivoj teras-kampoj etendiĝis de la montopiedo al la montosupro. Sur la kampoj kreskis maizo.

En la vagonaro oni konigis al mi pri la vojo kaj la urbo Tianshui. Ili diris al mi, ke Tianshui situas inter la Leŭsa Altebenaĵo en Longzhong kaj la montoregiono en Longnan. Tie ondas montoj kaj abundas riveroj. Longshan-monto estas tre malfacile transirebla. Antikvuloj diris, ke la montovojoj estas zigzagaj kaj oni bezonas 7 tagojn por transiri la monton.

Pro kompleksa topografio voj-konstruado estas ekstreme malfacila. Jam en la 40-aj jaroj en Tianshui funkciis fervojo 52 km longa kaj ŝoseo malbonkvalita. Tiam en multaj gubernioj ne estis aŭtovojoj kaj oni devis uzi flosojn por transiri riveron. La malfacila trafiko multe ĝenis Tianshui-anojn dum jarmiloj. Tiam oni bezonis dekojn da tagoj por vojaĝi de Xi'an al Tianshui.

La trajno malrapide rampis sur Longshan-monto. La pasaĝeroj ĝoje babilis aŭ dormis sur lito. Ili ne povis imagi al si la suferojn elportitajn de la vojaĝantoj en la pasinteco. Nur la multaj trapasitaj tuneloj serpentumaj kaj ĉeval-hufaj rememorigis pri malfaciloj de voj-konstruado en profundaj montoj. Post 8 horoj nia trajno finis la vojon, kiun la antikvuloj devis iri dekojn da tagoj. Ĝi atingis la Tianshui-an Stacidomon ĉe vespera krepusko kaj mi maltrankviligis pri tio, kiamaniere iri al la urboparto, kiu distancas de la stacio je pli ol 20 km. Post


SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO








Trajnoj verucantaj inter-montoj








En petrola stacio sur altebenajo.



Lokaj produktaj transportataj allokaj.



Trajno parte eliras el tunelo.



momento mi trovis nenecesa mian maltrankvilon: La aŭto portis min sur moderna aŭtovojo kaj post 20 minutoj mi jam sidis en hotelo de la urbo.

## LEGENDO PRI TIANSHUI

Tianshui kun longa historio estas fama industria urbo de la provinco Gansu. Restante en ĝi, mi informiĝis pri la deveno de ĝia nomo.

En la ĉina lingvo Tianshui signifas "ĉielan akvon". Legendo diras, ke iutage en la unua jarcento a.K. sude de la nuna Tianshui subite ekbrilis ruĝa lumo sur la tero, kiun sekvis fulmo-tondroj kaj tertremoj. La tero fendigis kaj akvo el la ĉielo verŝiĝis en la fendon kaj formiĝis lago. Ĉar la akvo estis pura kaj dolĉa, oni do diris, ke ĝi estas ligita kun tiu de la ĉielo kaj donis al ĝi la nomon Ĉiela Akvo. Poste, oni nomas Tianshui (ĉiela akvo) la urbon konstruitan ĉe la lago. Sciencistoj analizis, ke la lago formiĝis de tertremo kaj la akvo en ĝi venis el fontoj.

Kvankam la lago sekiĝis antaŭ tre longe, tamen en Tianshui ankoraŭ videblas multaj fontoj kun bonkvalita akvo. Oni diris, ke pro longatempa trinkado de tia akvo Tianshui-anoj havas haŭton tre delikatan. Tie estas ankaŭ multaj termofontoj, kies akvo estas utila por kuraci kronikajn malsanojn kaj dermatozon. Banado en termofonto estas bona ripozo por Tianshui-anoj. Dum mia restado en la urbo oni plurfoje proponis, ke mi banu min en termofonto, tamen pro hasteco mi ne havis tempon por la ĝuo.

## RAKONTO PRI SILKA POŝTUKO


La Silka Vojo naskiĝis kaj disvolviĝis pro silkafa komercado, tial ĉio, kio koncernas silkaĵojn, multe interesis min. En Tianshui oni rakontis al mi pri silka poŝtuko.

La rakonto temas pri bela kaj kortuŝa amafero: En la 4-a jarcento en Tianshui vivis paro da junaj geedzoj. Ili estis Su Hui kaj ŝia edzo Dou Tao, honesta ŝtatoficisto, kiu tamen estis kalumniita de insidemulo kaj ekzilita aliloken por fari pezan servutadon. La 23-jara Su Hui devis vivteni sin per brodado. Pasis kelkaj jaroj kaj ŝi neniu informon ricevis de sia edzo. Ŝi ege sopiris al li kaj verkis poemon por esprimi sian malĝojon. Ŝi faris brodaĵon kun la versoj sur silka poŝtuko. Tamen neniu komprenis la poemon, ĉar ĝi estis palindromo el 112 ideogramoj.

Dank' al la klopodado de Su Hui, fine estis reĝustigita la verdikto pri Dou Tao. Li denove ŝtatoficiĝis. Memore al la bonkora kaj kuraĝa Su Hui, oni konstruis altan arkaĵon.

Mi iris tien por rigardi la arkaĵon, sed, bedaŭrinde, kun tempopaso la arkaĵo jam ne videblas kaj mi vidis nur kelkajn rompitaĵajn steleojn pri ĝi.


Ĝojindas por mi, ke la kortuŝa rakonto jam gravuriĝis en la memoro de la popolo.





1. Statuo de antikva brokistino Foto de **WANG YICHUAN**
2. Aŭtovojo de Tianshui Foto de **WANG YICHUAN**
3. Sceno el la popolrakonto "En la Ĉielo" (Lakskulptaĵo)
4. En lakskulptaĵejo de Tianshui
5. "Sur la Silka Vojo" (Silka tapiŝo)

1	3	4
2	5	








Ceramikaj homo kaj kamelo

Ceramikaj homo kaj ĉevalo



Kupra dancanto de Tang-dinastio

## CERAMIKAJ FIGUROJ DE HOMO KAJ KAMELO

La Silka Vojo multe faciligis la kulturen interŝanĝon inter Oriento kaj Okcidento. En 1965, en Qin'an-gubernio, Tianshui, oni elterigis aron da trikoloraj ceramikaj figuroj de homo kaj kamelo. Ili estas la plej belformaj kaj plej grandnombraj historiaj objektoj de Tang-dinastio elterigitaj ĝis nun en Gansu-provinco. Inter la ceramikaj figuroj ne mankas tiuj de ĉinaj nacimalplimultanoj kaj okcident-aziaj komercistoj, kameloj kaj ĉevaloj.

En la Provinca Muzeo de Gansu kaj Gubernia Muzeo de Qin'an (Ĉin'an) mi vidis tiajn figurojn. Iu el ili bildigas homon altan 78.8 cm kaj tirantan kamelon 94 cm. La tiranto estas tre eleganta, kun nigra ĉapo sur la kapo, botoj sur la piedoj kaj flav-verda robo kun neĝblanka kolumo turnita eksteren. Li, kun grandaj okuloj en profundaj orbitoj, alta nazo, larĝaj nazloboj, nigraj-flavaj haroj kaj barbo, aspektas kiel tipa okcident-azia komercisto. Apud li staras kamelo henanta kun alte levita kolo. Krome,

en la gubernia muzeo estas ankaŭ ceramikaj figuroj de okcident-azianoj tirantaj ĉevalon aŭ rajdantaj sur ĝi, trikoloraj ceramikaj figuroj de kamelo, persaj moneroj kaj aliaj historiaj objektoj rilataj al la okcident-azia kulturo. Ili montras la amikan kontakton inter la popoloj ĉina kaj okcident-azia en la antikveco.

La elterigitaj historiaj objektoj montras ankaŭ, ke preskaŭ samtempe kun la naskiĝo de la kamel-tirantaj homfiguroj enkondukiĝis en Tianshui okcident-aziaj muzikiloj, kiaj *konghou*-o, bivo kaj fluto, kaj belaj muzikaĵoj de Qiuci (Ĉiuci), Yutian (Jutjan) kaj Shule. Tie furoris ankaŭ okcident-aziaj dancoj ne nur inter aristokratoj, sed ankaŭ inter popolanoj.

Komercado sur la Silka Vojo multe prosperigis la ekonomion de Tianshui. Tie vendiĝis produktaĵoj de okcidenta Azio kaj kreskis ĝiaj fruktarboj. Kompreneble, ankaŭ produktaĵoj de Tianshui, kiaj lakaĵoj, silkaj tapiŝoj kaj drogherboj, eksportiĝis al okcident-aziaj landoj. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* E-klubanoj, 20-35-jaraj, kun hobiaj de arto, sporto, muziko, kolektado ktp., dez. kor. tutmonde por amikeco. Skribu Esperante aŭ angle al: P.O.B. B-818, Jinrong Huayuan, Longkun Beilu, 570125 Haikou, Hainan, Ĉinio.

\* Rusnacia senfamilia mezaĝa inĝeniero, s-ro Gu Yinglin, dez. kor. por edziĝo. Adr.: Kunshan Huagongchang, 215300 Kunshan, Jiangsu, Ĉinio.

\* S-ro Li Chuanhua dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Shuyuanlu No 94, 413100 Yuanjiang, Hunan, Ĉinio.

\* Juho Ilmari Vattulainen volas kor. kun geesperantistoj tutmonde. Bonvolu klare skribi vian nomon kaj adreson por ke mi povu respondi. Adr.: Rantakylantie 64, 81160 Romppala, Finnlando.

\* Hano Bruno Lutete, 31-j., dez. kor. kun geĉinoj, gekoreoj kaj gejapanoj. Temo: komputilo, komerco, vojaĝo kaj turismo. Adr.: B.P. no. 31 Matadi 02, Matadi, Zaire.

\* Salwomir Szymala, 33-j. oficisto, dez. kor. tutmonde. Respondo garantiata. Adr.: P.O. Box

486, 42-217 Czestochowa 17, Pollando.

\* Ĉernova Irina, 18-j. studentino, dez. kor. tm. Adr.: Do vostrebobanija, Ĉeboksari, 428022, Rusio.

\* Inga Monika Grinceviciute, 17-j. mezlerneja lernantino, dez. kor. Respondo garantiata. Adr.: Gelvonu 3-79, 2010 Vilnius, Litovio.

\* S-ro Simakin Vitalij, 30-j. sendependa psikologo, prezidanto de urba junulara socia organizaĵo, serĉas samideanojn, interesiĝintojn en sferoj: netradiciaj metodoj de edukado, psikokorekto, terapio, neordinaraj vivmanieroj, "ekzotika" antropologio ktp. Adr.: Armavir-9, a/ja 9, Krasnodarskij kraj, 352909, Rusio.

\* 32-j. s-ino Natali Šadjko dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: ul. Gruspevskogo 89/1-74, 293720 Drogobič, Lvivska obl., Ukraina.

\* Alexandra, 9-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: 13-25, Igonina Nijnevartovsk-6, Str. Pobeda, 626440 Siberio, Rusio.

\* Qiaoqiao, 7-j. knabino, volas korespondi kun knaboj pri belartaĵoj ktp. Esperante. S-ro Cosmy. Hu Xiaochun, volas kor. por kolekti antikvaĵojn, kolektaĵojn (stampo, bankbilo, presaĵo ktp.) kaj servi al vi pri vojaĝo al Ĉinio. Skribu Esperante aŭ angle. Adr.: Jianhua Guanggao Gongsi, Jianhua Qiye Jituan, Huangguaying, Haigenglu, 650034 Kunming, Yunnan, Ĉinio.



# Blanknaĝila delfeno — trezoro de Ĉinio

**O**NI scias, ke pando estas trezoro de Ĉinio, sed nur malmultaj scias, ke blanknaĝila delfeno estas same rara kiel pando. Blanknaĝilaj delfenoj ĝenerale vivas en Dongting-lago kaj la meza kaj malsupra partoj de Yangzi-rivero. Ili naĝas en paroj aŭ grupoj. De miloj da jaroj la tieaj fiŝistoj rigardas ilin kiel “mirfiŝojn”, kiuj kapablas venigi venton kaj pluvon. Ili estas tre sensivaj al vetero. Antaŭ ŝtormo ili aperas sur akvosurfaco por fari veteran prognozon.

## PALEONTOLOGIA VIVA FOSILIO

La blanknaĝila delfeno, alinome sensalakva delfeno, kun grizblua dorso kaj blanka ventro,

estas propra al Ĉinio. Ĝi estis enlistigita ne nur kiel unuaklasa sovaĝbesto protektata de la ŝtato, sed ankaŭ kiel unu el la 12 specioj da bestoj alproksimiĝantaj al perejo en la mondo, statistikitaj de la Internacia Unio por Protektado de la Naturo kaj Naturaj Riĉfontoj en 1986.

La blanknaĝila delfeno aperis antaŭ almenaŭ 25 milionoj da jaroj. Ĝiaj prapatroj estis mamuloj vivantaj sur la tero. Poste, pro natura ŝanĝiĝo ili ekvivis en akvo. Por adaptiĝi al la vivo en akvo la antaŭaj membroj de la delfeno transformiĝis en naĝilojn kaj la postaj degeneris post longtempa evoluado. La paleontologia viva fosilio ne nur estas grava por esplori evoluadon kaj kreskon de balenoj, sed ankaŭ havas grandan

valoron por bioniko, biologio, zoologio kaj milita scienco, ĉar ĝi havas spritan cerbon kaj lertan sonsondan sistemon.

## “BELULINO EN AKVO”

La blanknaĝila delfeno estas tre interesa mamulo. Ĝi vivas en akvo kaj havas korpon similan al tiu de fiŝo, tamen ĝi ne estas fiŝo. Kiel senbrankulo, ĝi elakviĝas por spiri per la pulmoj en ĉiu kelkdeko da sekundoj. Timigite, ĝi povas enakviĝi por kelke da minutoj. Ĝi, kun plata bekforma buŝo, havas akrajn dentojn, tamen ĝi glutas nutraĵon sen maĉi. Ĝiaj okuloj, malgrandaj kiel sojfabo, troviĝas ambaŭflanke de la frunto kaj ĝia nazo sur la verto. Ĉe spirado ĝi unue elakvigas sian kapon kaj kelkiam ŝprucigas akvokoloneton. Ĝi naĝas rapide, eĉ pli ol torpedo.

Matura blanknaĝila delfeno longas proksimume 2-2.5 m kaj pezas 200-300 kg. Ĝia vivdaŭro estas ĉ. 25 jaroj. Ĉiu blanknaĝila delfenino naskas unu idon jare, kaj hazarde du. Novnaskita blanknaĝila delfenino ne povoscias naĝi, kaj ĝia patrino elakvigas ĝin per sia dorsnaĝilo aŭ kapo. Se la ido estas mortinta, ĝia patrino kiel kutime subportas ĝin. Se ĝi falas, la patrino denove prenas ĝin kaj forlasas ĝin nur ĉe putriĝo. Mamsuĉante, malgranda blanknaĝila delfeno kuŝas sub la akselo de sia patrino. Delfenino havas tre grandajn mamojn, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon “blan-



Qiqi en nova hejmo

ka knabino" aŭ "belulino en akvo".

La blanknaĝila delfeno estas miopulo, tamen ĝi sufiĉe lertas sondi vivaĵon, serĉi kunul(in)on kaj fuĝi de danĝero. Kun sonsonda sistemo ĝi scipovas libere naĝi en nokto. Ĝi povas elsendi el la gorgo ultrasonon, kiu antaŭeniras kiel ondoj kaj tuj reflektiĝas, frapinte sin kontraŭ barojn.

Oni diris, ke eĉ la plej avangarda sonsonda tekniko en la mondo ne povas rivali kun la altpreciza kaj artefika eĥo-lokaliza kapablo de blanknaĝila delfeno.

### "NOVA HEJMO" DE BLANKNAĜILAJ DELFENOJ

Januare de 1980 oni kaptis blanknaĝilan virdelfenon en Yangzi-rivero. Informiĝinte pri tio, sciencistoj de la Ĉina Esplorcentro pri Blanknaĝilaj Delfenoj en Wuhan en la meza baseno de Yangzi-rivero tuj venis al la loko kaj transportis ĝin en la centron. Ili donis al ĝi la nomon Qiqi (Ĉjiĉji).

Post plurjara nutrado Qiqi fariĝis seksmatura, 125 kg peza. Por serĉi kunulon por Qiqi, la esplorcentro kaj koncerna departemento kune ekagis. Fine estis kaptitaj du blanknaĝilaj delfenoj, vira kaj ina. Ili kaj Qiqi konsistigis novan familion. Ili kune vivis en baseno kun areo de pli ol 20 000 kvadrataj metroj. Estis la unua fojo, ke oni komencis bredi blanknaĝilajn delfenojn en la mondo.

Sciencistoj de la Ĉina Esplorcentro pri Blanknaĝilaj Delfenoj, post multjara esplorado, venis al la konkludo: Ĝenete de homa aktivado, blanknaĝilaj delfenoj rapide malmultiĝas. Nun estas nur ĉ. 130 tiaj delfenoj. Estas neeble nature reproduktiĝi por ili. Se oni ne alprenas rimedojn, ili ĉiuj pereos en la venontaj 25 jaroj.


Sciencistoj de la esplorcentro opiniis, ke el la tri rimedoj por protekti rarajn sovaĝbestojn, nome ĉeloka protektado, migra

protektado kaj fondo de ĉelbanko (arta reproduktado), migra protektado plej konvenas al blanknaĝilaj delfenoj.


Nun, krom la naturparkoj de blanknaĝilaj delfenoj en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-

En la loko ne estas industria nek vivmedia poluado. Tie estas malpermesite fiŝkapti kaj tiel abundas fiŝoj por nutri blanknaĝilajn delfenojn.

Ke la blanknaĝilaj delfenoj sin liberigu de la detruita biomedio,



Sciencistoj ekzamenas la sanstaton de Qiqi.



Akvotrakta sistemo en bredejo de blanknaĝilaj delfenoj

rivero, Ĉinio starigis ankaŭ kelkajn bredejojn kun migraprotektaj kondiĉoj por esplori reproduktadon, generadon kaj nutradon de blanknaĝilaj delfenoidoj. La bredejo de blanknaĝilaj delfenoj de Shishou en la meza baseno de Yangzi-rivero troviĝas en la malnova vojo de la rivero.

senĝene vivu kaj reproduktiĝu en la artefaritaj "hejmoj", tio sendube estas granda deziro de la sciencistoj de la Ĉina Esplorcentro pri Blanknaĝilaj Delfenoj, kaj ilia pli granda deziro estas revenigi la delfenojn en la naturon. ■



# Media protektado en la antikva Ĉinio

de YUAN QINGLIN kaj ZHU JIANG

**E**N la prahistorio la homaj prapatroj sin vivtenis per kolektado de sovaĝaj fruktoj, kaptado de fiŝoj kaj ĉasado. Poste ili nebule konsciis pri rilatoj inter si mem kaj la naturo, kaj totemismo ja estis speguliĝo de tiu konscio. Eble tio povus esti rigardata kiel la primara medioprotekta intuicio de la homaro, malgraŭ ke tio ne estis memkonscia kono kaj implicis ĉefe superstiĉon.

Arkeologiaj materialoj montras, ke la primitiva agrikulturo de Ĉinio originis antaŭ 7-8 mil jaroj. Tiam, pli kompaktis la rilatoj inter homoj kaj tero, klimato, akvo kaj aliaj naturaj riĉfontoj. Kaj la produkta praktikado en la sekvantaj jarmiloj komprenigis ilin: Postulante de la naturo, oni devas ankaŭ ĝin protekti.

## LEGENDO DE PRATEMPO

Reĝo Shun (antaŭ la 21-a jarcento a.K.) estis gvidanto de tribunio en la lasta periodo de la patriarka klana socio. Legendo diras, ke tiutempe estis homo nomata Bo Yi, kiu sciis la birdan kaj bestan lingvon, Shun do komisiis al li administron de montoj, riveroj, arboj, lagoj, birdoj kaj bestoj. Tiu eble estis la “medioprotekta oficisto” plej frua en la historio. Post forpaso de Shun, kies tronon heredis Yu, Bo Yi daŭre funkciis kiel grava oficisto. Li ne nur kunlaboris kun Yu en subigo de diluvo, sed ankaŭ helpis al tiu elabori leĝon protektan de la montoj, riveroj, birdoj kaj bes-

toj. La leĝo indikis: “En la tri printempaj monatoj estas malpermesate kunporti hakilon en la arbaro, favore al kreskado de la arboj kaj la herboj; en la tri someraj monatoj malpermesate ĵeti reton en riverojn kaj lagojn, utile al generado de fiŝoj kaj kelonioj.”

## MALFERMI RETOJN TRIFLANKE

Xia (la 21-a — la 16-a jc a.K.) estis la unua dinastio en la ĉina historio, poste pereigita de Tang, fondinto de la dinastio Shang (la 16-a — la 11-a jc a.K.). Historia libro notis jenan rakonton: En la lastaj jaroj de la dinastio Xia, estiel regnestro, Tang foje vidis homon etendanta reton por kapti birdojn sur kampo. La homo sternis reton en direktoj orienta, okcidenta, suda kaj norda, kaj preĝis: “Enretigu la birdoj el ĉiuj direktoj sub la ĉielo.” Aŭdinte tion, Tang diris kun rideto: “Vi ja celas ekstermi ĉiujn birdojn de la mondo!” Li do ordonis forpreni la reton en tri direktoj kaj restigis ĝin nur en unu direkto. Ankaŭ li preĝis: “Flugu la birdoj dekstren aŭ maldekstren laŭplaĉe, kaj falu en la reton, se ne obeos mian ordonon!”

Montoj kaj riveroj provizas la homaron per vivbezonoj, kaj eventuala finhakado kaj finkaptado damaĝas la homaron mem. Ĉar Tang bone komprenis tion, tial li estis rigardata kiel prudenta reganto. Kiam li ekspediciis kontraŭ Xia, li estis subtenata de ĉiuj aliaj regnestroj. Li rapide renversis la dekadencan dinastion Xia kaj fon-

dis la dinastion Shang.

## “ZHOU LI” KAJ TERA OFICISTO


En la lasta periodo de la dinastio Zhou (ĉ. la 11-a jc — 256 a.K.) aperis libro “Zhouli”, kiu notis la oficistan sistemon de la dinastio kaj divers-regnajn sistemojn politikajn kaj ekonomiajn. Interalie la sistemo de “tera oficisto” koncernis la median protektadon.

Tera oficisto estis destinita por administri la naturajn riĉfontojn, kaj ties rango egalas al ministro nuntempa. Sub tiu instaliĝis ankaŭ la oficistoj respondecaj pri riĉfontoj, minaĵoj kaj agrikulturo respektive. En la libro “Zhouli” estas jenaj difinoj, ke printempe, kiam herboj kaj arboj ĝermas kaj floras, birdoj kaj bestoj sin trovas en generado, la oficisto respondeca pri montoj kaj arboj devas malpermesi arbo-hakadon kaj ĉasadon; somere, kiam fiŝoj kaj salikoj frajadas, la oficisto respondeca pri riveroj kaj lagoj devas gardi tiujn kontraŭ kaptado de la akvaj produktaĵoj...

Per la postenigo de “tera oficisto”, oni oficiale enkodigis la median protektadon kiel ŝtatan sistemon. Tio montris, ke tiutempe la media protektado havis certan evoluon.

## “MEDIA KONCEPTO” DE POLITIKISTOJ

En la periodoj Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj antaŭ pli ol 2 000 jaroj, Ĉinio estis dispecigita kaj la socio en grava



Difinoj pri arbo-protektado en la libro “Zhouli”

ŝanĝiĝo. Por fini militan tumulton kaj unuigi Ĉinion, la tiamaj politikistoj publikigis ĉiu siajn opiniojn pri la ŝtata regado kaj debatis inter si. Interese estis, ke iliaj argumentoj ofte tuŝis la median protekton.

Guan Zhong, ĉefministro de Qi-regno, opiniis, ke en la ŝtata regado nepre necesas "entrepreni la bazan aferon kaj akcenti la konkretan praktikadon". En liaj okuloj la baza afero estis agrikulturo — nur disvolvante agrikulturon oni povas prosperigi regnon. Tial, por ke la popolanoj absorbiĝu en terkulturado, kiel ajn riĉa estas la regnestro, li devas sin brideti en konstruado de palacoj; kiel ajn vastaj estas la montaj kaj arbaraj fontoj, ili devas esti ekspluatataj laŭsezone; kaj kiel ajn abundas la akvaj fontoj, la popolanoj ne devas sin kroĉi nur al fiŝkaptado por vivteno. Liaopinie, efektivigante la malpermesan ordonon pri montoj kaj riveroj, la antaŭa regnestro celis nur, ke la popolanoj estu trankvilaj en la agrikultura produktado. Tiu ĉi opinio ŝajnas iom ekscesa, sed lia alia opinio estas rimarkinda: Se oni ignoras pliproduktigon de la ekzistantaj agroj, kaj esperas disvolvi agrikulturon kaj pliigi la grenan produktokvanton per pli da novaj agroj senarbarige, tio estas nepraktikebla.

Alia fama pensulo Mengzi siatempe pledis por tio, ke homoj devas havi vastan amon, ami ne nur siajn karulojn kaj ĉiujn aliojn, sed ankaŭ ĉiujn estaĵojn de la universo, nome la medion rilatantan al la homaro. Ĉar, la homoj estas konsistiga parto de la naturo, tial, la homoj kaj naturo devas akorde kunekzisti kaj kunfandiĝi en unu harmonia tuto. Tio estas lia penso pri "unueco de la ĉielo kaj homoj".

Komentante "reĝan doktrinon" pri la ŝtata regado, Xun Kuang (Ŝjun Kŭang) el la regno Zhao proponis nuligi impostojn super tero, monto, arbaro, rivero kaj lago por redukti ŝarĝon de kam-

paranoj kaj homan detruon al naturaj riĉfontoj. Li opiniis ankaŭ, ke la kvar sezonoj de la naturo alternas laŭ la definitiva leĝo. Grenoj povos riĉe rikoltiĝi kaj popolanoj havos sufiĉe da nutraĵoj kaj vestoj, se nur la regnestro, laŭ la naturaj leĝoj, organizos la popolanojn en printempa plugado, somera sarkado, aŭtuna rikoltado kaj vintra rezervado, ne malobservante la terkulturan tagordon. Koncerne la naturon, oni devas lasi florojn, herbojn kaj arbojn, birdojn, bestojn, fiŝojn kaj salikojn vivi laŭ siaj propraj leĝoj, nur tiamaniere la popolanoj povos havi neelĉerpeblajn lignon kaj manĝaĵojn.

Han Feizi, disĉiplo de Xun Kuang, elmetis sian vidpunkton surbaze de la loĝantara problemo. Li diris, ke antikvuloj ne kultivadis, ĉar la fruktoj de herboj kaj arboj sufiĉis por ilin nutri; virinoj ne ŝpinteksis, ĉar feloj de bestoj kontentigis la vestan bezonon de ĉiuj. Tiam malmultis la loĝantoj, kiuj povis sin vivteni ne multe klopodante, rezulte, la popolanoj ne batalis inter si. Kaj nun multaj homoj havas ĉiu kvin filojn, sed ĉiu filo ankaŭ havas kvin filojn, kaj avo, ankoraŭ vivanta, jam havas 25 nepojn. Kun paso de la tempo, pli kaj pli multiĝas la loĝantoj kaj malpliĝas la riĉfontoj. Kvankam oni pene laboras, oni ne havas sufiĉe da manĝaĵoj kaj vestoj, kaŭze de tio aperas disputo kaj konflikto, kaj la ŝtato ne povas eviti socian tumulton, eĉ plipeziligante punojn. La analizo de Han Feizi estis tre trafa. Kvankam la socia tumulto estas kaŭzita ne certe de la loĝantara problemo, tamen la loĝantara kreskado ja ofte kaŭzas median krizon.

## IDIOTISMO KAJ PRIMITIVA ADORADO

La konscio de antikvaj ĉinoj pri amo al la naturo kaj la vivaĵoj montriĝas ankaŭ en multaj idiotismoj kaj anekdotoj, ekz. "Ne haku arbon kreskantan." "Ne kaptu fiŝon nematuran." "En la drenita lago fiŝkaptado estas sendube

facila, tamen neniam da fiŝoj oni kaptos venontjare." "Faligi neston por ovo ne vidigos plu fenikson." Ĉiuj ĉi tiuj temas pri tio, ke oni ne devas detrui eternan utiligon de riĉfontoj, ĉasante nur portempan profiton. Komprenoble, la saĝaj antikvuloj prenis tiujn ankaŭ kiel aludojn, por konvinki homojn en aliaj aferoj.

Por la prauloj, ĉio en la naturo estas mirinda, tial ili "favoras ĉion kiel dion". Historia libro notis: Iu reĝo amis soforon kaj rigardis ĝin dio. Li ordonis zorgeme gardi la soforon kaj dekretis: "Kiu ofendos la soforon, estos punita. Kiu vundos ĝin, estos mortigita."

La dio-respektaj antikvuloj fakte apoteozis kaj protektis estaĵojn anstataŭ la nevideblan dion, rezulte de tio restas al la posteuloj valoregaj naturaj riĉfontoj. Ekz., la verdaĵoj de la primitiva arbaro en la Granda Xing'an (Ŝing'an)-montaro de nordorienta Ĉinio nun ankoraŭ vivas ĝuste dank' al la primitiva adorado. Laŭ opinio de antikvuloj, la homaro originis el arbaro, kaj fine revenos tien. Pro tio la Granda Xing'an-montaro kovrita de la verdaj arbaroj fariĝis dia montaro por ili, protektata de ĉiuj generacioj.

Similaj fortunaj lokoj estas multaj en Ĉinio, ekz. la kvin diaj montoj Taishan, Huashan, Songshan, Hengshan (en Shanxi) kaj Hengshan (en Hunan), la kvar famaj budaismaj montoj Wutai, Emei, Putuo kaj Jiuhua, kaj ankaŭ imperiestraj palacoj kaj maŭzoleoj de diversaj dinastioj. Hodiaŭ, kiam en- kaj eksterlandaj turistoj vojaĝas al Shennongjia (Ŝennongĝja), Jiuzhaigou (Ĝiŭĝajgoŭ),

Zhangjiajie (Ĝangĝjaĝje), Huangshan-monto, Lushan-monto kaj aliaj naturaj pejzaĝoj kaj estas sorĉitaj de ilia ĉarmo, ili ne povas ne danki la antikvajn ĉinojn; sen iliaj protektaj konscio kaj agado kun superstiĉa nuanco, ĉu en Ĉinio multe suferinta de militaj tumultoj kaj historiaj ŝanĝiĝoj ankoraŭ vidiĝas tiel multe da mirigaj kaj belegaj vidindaĵoj? ■



# Antikva urbeto Zhongxiang



La maŭzoleo de la gepatroj de imperiestro Jiajing

**S**ITUANTA meze de Hubei-provinco, Zhongxiang (Ĝongŝjang) estas ordinara urbeto, tamen ĝi havas historion de pli ol 4 000 jaroj. En la urbeto elteriĝis nigra terpoto de neolitiko, tio montras, ke jam antaŭ 5 000 jaroj homoj ekloĝis tie.

La lokanoj ofte rakontis pri Orkidea Podio. Antaŭ 4 000 jaroj, inundo atakis la lokon, Granda Yu (Ju) gvidis dragon de la riveroj, foson de kanaloj kaj konstruon de alta podio en la orienta, okcidenta kaj meza partoj de la loko. Post la inundo, oni plantis orkideojn sur la podio, do naskiĝis la nomo "Orkidea Podio" kaj la urbeto iom post iom formiĝis ĉirkaŭ la podio.

Fama poeto en frua periodo de ĉina literaturo Qu Yuan (Ĉju Jŭan) kaj lia disĉiplo Song Yu siatempe loĝis tie. Antaŭ 2 000 jaroj en la Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) la loko funkciis kiel ĉefurbo de la regno Chu. Kiel altranga oficisto, Qu Yuan ofte diskutis pri ŝtataj aferoj kun la regnestro sur la podio. Dekadencaj aristokratoj insidis kontraŭ Qu Yuan, kaj tiu poste ekziliĝis por longa tempo. Li maltrankviliĝis pri sia patrolando kaj per poemoj admonis la regnestron, ke li ne konfidu kalumniojn kaj reformu politikon por potencigi la landon. En siaj poemoj Qu Yuan komparis sin kun orkideo kaj ĵuris neniam kunlabori kun la insi-

demaj flatemuloj. Fakte la dekadencia Chu-regno estis fine pereigita de potenca Qin-regno. Qu Yuan ne povis elteni sian malĝojon kaj indignon, kaj sin dronigis en rivero je la 5-a de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Memore al li, oni plenigis bambutubojn per glueca rizo kaj verŝis la rizon en la riveron. Poste oni envolvis gluecan rizon en bambuaj folioj kaj pakis ĝin per koloraj fadenoj. Tio jam fariĝis ĉina tradicio en la 5-a de la kvina monato.

Qu Yuan verkis poemojn en dialekto de Chu-regno kaj kreis "Chuci-stilon". Ankaŭ lia disĉiplo Song Yu verkis en tia stilo en palaĉoj sur la Orkidea Podio. En liaj verkoj legiĝas: "Turisto kantis sur la Orkidea Podio. Kiam li kantis popularan kanton 'Kanto de la Kamparanoj', miloj da homoj sekvis. Kiam li kantis la elegantan 'Printempa Neĝo', nur kelkdek sekvis. Ja ju pli elegantas la kanto, des pli malmultas la sekvantoj." Poste "Kanto de la Kamparanoj" kaj "Printempa Neĝo" fariĝis sinonimoj de "populara arto" kaj "eleganta arto" respektive. Kiam oni parolas pri "Kanto eleganta, sekvantaro malmulta", ĝi signifas ke elito havas malmultajn komprenantojn. Malgraŭ tio "Printempa Neĝo" iuj komprenas. Artistoj de Chu-regno adaptis ĝin al kanto kaj danco kaj dank' al tio ĝi herediĝis.

Zhongxiang estis hejmloko de imperiestro Jiajing (1521-1565 sur trono) de Ming-dinastio. Ja estis ĝuste tiu suvereno, kiu ekonomis la urbeton "Zhongxiang" kun la signifo "Feliĉo kolektiĝas". Jiajing imperiestriĝis en la aĝo de 15 jaroj. Historiistoj opinias, ke en lia 45-jara regado la ĉina "ekonomio tre aktivis, agrikulturo, tekstila kaj metia industrio progresis." Li estis rigardata kiel "Reprosperiga Suvereno". Rakontoj diras, ke por prosperigi agrikulturon kaj tekstiladon, li persone laboris en kamparo, kaj lia edzino kulturis silkraŭpojn. Li alte taksis komercon kaj edukadon, kelkdekfoje li ordonis asigni monon por konstrui lernejojn kaj ordonis revizii kaj presi la faman romanon "Tri Regnoj".

La urbeto Zhongxiang similas al historia muzeo, kie troviĝas ruino de Orkidea Podio konstruita antaŭ miloj da jaroj, pavilono de Song Yu, domo de artistino, palacoj de Ming-dinastio kaj maŭzoleo konstruigita de Jiajing por siaj gepatroj. Ĉiuj tiuj kunestas kun la popolaj loĝdomoj kaj montras antikvecon de la urbeto. Oni vidas la antikvecon ankaŭ ĉe la centjaruloj. La urbeto iam ĝuis la nomon "loko de longvivuloj". Nun tie vivas multaj centjaruloj. Por koni la sekreton de ilia longviveco, oni ja devas persone viziti Zhongxiang, kies gastamaj loĝantoj vin bonvenigos. ■

## *La sesa konkurso de EPĈ-legado finita*

En la novembra numero de 1995, ni aperigis la demandaron de la sesa konkurso de EPĈ-legado. Dum tri monatoj de la pasinta novembro ĝis la ĉi-jara januaro, ni ricevis 134 respondoj el 32 landoj. La nombro duobligis kompare kun tiu de la lasta konkurso. La partoprenantoj el Jugoslavio, Francio, Brazilo, Rusio, Rumanio, Italio kaj Ĉinio estis kompare multaj.

Inter ili iuj unuafoje partoprenis kaj aliaj plurfoje; iuj individue partoprenis kaj aliaj familie. Multaj legantoj diris, ke plaĉis al ili tiuspeca konkurso. Manuel Alberto el Belgio skribis: "Mi volas gratuli EPĈ pro la tre interesa iniciativo organizi la tiuspecajn konkursojn. Por bone respondi la demandojn, ni devas relegi la 10 koncernajn numerojn de EPĈ. Pro tio, ni denove 'malkovras' kaj relernas tre interesajn faktojn pri Ĉinio. Mi mem, tre ĝuis, dum tri tagoj, la tralegon de 10 numeroj de EPĈ. Mi tre dankas vin pro tio." Caio Cesar Ferreira Matos el Brazilo diris: "Foliumante miajn revuojn de la kuranta jaro por respondi la konkurson, mi povis konstati, kiom mi denove rememoris kaj lernis pri Ĉinio kaj ties popolo. Partopreni la konkurson, krom la premion, ni gajnas ankaŭ la eblecon restudi pri Ĉinio, kio por mi estas tre ŝatata." Abdurahman Junusov el Rusio diris: "Preparante

miajn respondojn, mi ankoraŭfoje kun plezuro trarigardis la numerojn de la jaro, relegis diversajn artikolojn. Kaj malproksima Ĉinio iĝis pli proksima..."

Estis en la jarŝanĝo, preskaŭ ĉiuj partoprenantoj adresis al ni novjarajn salutojn kaj bondezirojn. Iuj el ili sendis belajn kartojn. Tiuj ĉi tre varmigis nian koron. Ĉi-okaze en la nomo de la redakcio mi esprimas al tiuj legantoj koran dankon kaj deziras al ili sanon, feliĉon kaj sukceson en laboro!

Inter la 134 partoprenantoj 120 ĝuste respondis ĉiujn demandojn. Pro multigo de la partoprenantoj, ni decidis pliigi la nombron de la premiitoj. Post lotumo, ni anoncas, ke la unuagrada premion gajnis Madeleine Tourtois el Francio kaj Arunas Karlauskas el Litovio. Ili ricevis po unu grandan faldventumilon kun ĉina pentraĵo. La duagrada premion gajnis Siro Koga, Kristian Jozef, Caio Matos, Bernard Wheel, Tatjana Auderskaja, Alberto Martini, Juhasz Viola, Milorad Djurdjevic, Josep Serrano, Carlos Alberto Ferreira Silva kaj liaj familianoj. Ili ricevis po unu esperantigitan ĉinan klasikan novelaron "Mirrakontoj de Liaozhai". La triagrada premion gajnis Ernst Quietensky, Szentgyorgyi Zoltan, I. Scepanovic Truto, Wang Yongliang, Olga Perhaj, Gambhir Man Shrestha, Nikolao Makovej, Willy Ehlers, Aira kaj

Erkki Rontynen, Barbara Yaszczak, Repac Marija kaj Branko, Waldomiro Arenhart, Nina Bjikjan, Mariano D. Ibanez, Rigault Louise Run David, Jozef Vojaček, Nagy Zambo Etelka, Joan Dawson, A. Chernocvan kaj Ekaterina Popoviciu. Ili ricevis po unu Esperantan libron "Ĉina Enciklopedieto". Al iuj gajnintoj ni sendis ne la supre menciitajn librojn, sed ĉinajn poŝtmarkojn, la revuon EPĈ de 1996 aŭ aliajn laŭ iliaj deziroj. Ni sendis memoraĵojn al tiuj, kiuj ne gajnis premion sed ĝuste respondis ĉiujn demandojn.

La ĝustaj solvoj estas jene (ciferoj en parentezo markas numeron kaj paĝon, en kiuj troveblas la ĝusta solvo): 1. "Ni, la popoloj — unu mondo aŭ disaj eroj" (6-9); 2. Grandaj Sonoriloj (7-29); 3. 32 (4-48); 4. Reinhard Selten (5-24); 5. Hejmsopira Stelo (9-14); 6. verdigado (10-4); 7. Printempo en la Aŭtuno (3-16); 8. la 7 (9-42); 9. Bohai-marĝo (1-20); 10. la unuan (8-20). El la respondoj, ni povas vidi, ke oni eraris ĉefe en la dua, la sepa kaj la deka demandoj.

Ni daŭre organizos konkurson de EPĈ-legado. Bonvenaj estos viaj konsiloj kaj proponoj. Ni esperas, ke pli da legantoj partoprenos en la sepa konkurso de EPĈ-legado, kies demandaron ni aperigos en la novembra numero de 1996.



# Puzlero, plezuro, perlujo

de YU TAO

*Malantaŭ la muro — puzleroj pri Ĉinio*

Tokio: Internacia Kultura Laborejo. 1994

72-6 p. 21 cm. Ilustrita. Prezo: 18,00 gld.

La Granda Muro estas honora

monumento de la ĉina popolo. Por alilandanoj ĝi estas simbolo de Ĉinio. Ni ĉinoj legis multe pri la Granda Muro, tamen "malantaŭ la muro" ne estas kutima esprimo por ni. Tiu nova esprimo venas de libreto pri Ĉinio verkita de finna fraŭlino studanta en Germanio.

donis al Ĉinio novan esperon, kaj la mondo estis scivolema pri la antikva lando, kiu malfermis sian pordon. Sabira skribas: "Tiam la granda Universala Kongreso de Esperanto allogis homojn el diversaj mondo-partoj al Pekino por semajno bankedo- kaj vizito-plena, semajno plena je novaj spertoj kaj konatoj."

*Malantaŭ la muro — puzleroj pri Ĉinio* estas nova verko de nia samideanino Sabira Stahlberg. Kial tiu eŭropa junulino interesiĝis pri Ĉinio? Estas Esperanto, kiu ligis Sabira kun Ĉinio.


En 1984 Sabira eklernis Esperanton kaj en la sekvanta jaro fariĝis vicprezidanto de la Finnlanda Esperantista Junulara Organizo. Por ŝi la unua Universala Kongreso de Esperanto estas la 71-a UK, kiu okazis en 1986 en Pekino.

Tiam reformado

La unua UK en Ĉinio, la unua UK por Sabira, tamen tia historia okazaĵo ne donis al ŝi belan impreson pri Pekino kaj Ĉinio. Jen ŝia sento: Mi ĝojis pri la kongreso, ĝi estis ĝuste tiom granda kaj kaosa, kiom mi imagis. Sed malgraŭ la agrabla kongreso, mi rapide konstatis ke Pekino kiel urbo absolute ne plaĉis al mi. La vortoj "absolute ne" ŝajne metis finon al la kontakto inter Pekino kaj Sabira.

"Foje la sorto ludas ironie", pravas Sabira. En 1987 ŝi diplomitiĝis el mezlernejo kaj elektis la fakon de Orienta Azio inter pluraj fakultatoj de la Universitato de Helsinko. Post kelkmonata studado, kun kono pri ĉ. 500 ĉinaj ideogramoj, ŝi sola venis denove al Ĉinio.

Do daŭras ŝia kontakto kun Ĉinio. En 1988 ŝi estis invitita al Qingdao (Ĉingdaŭ) por ĉeesti la inaŭguron de la televida



Esperanto-kurso "La Espero". En la ĉapitro "Montoj, bankedoj kaj Konfuceo" de la libro oni trovas komprenon de eŭropa studentino pri la ĉina tradicia kaj klasika kulturo.

La ĉapitro "Sur la nekonata Ora Vojo" priskribas spertojn de Sabira en nordokcidenta Ĉinio en la aŭtuno de 1993. Tiam ŝi magistriĝis kiel ĉinologo kaj ekstudis por doktoriĝo. Kiam ŝi revenis de la "pipra kaj flava" Gansu-provinco al Pekino, kune kun ŝi iris la amikeco de ĉinaj popolanoj.

En la ĉapitro "Spuroj" Sabira resumas sian kontakton kun Ĉinio. Ŝi prezentas al ni sian songon: kiel Zhuangzi (Ĝjŭangzi) songis ke li estus papilio, Sabira songis ke ŝi ĝuas la tempon en Ĉinio, ŝi songis ke ŝi estas kaj ĉineca kaj finneca. Ankaŭ mi ne povas certigi, ĉu ŝi estas pli ĉina aŭ pli eŭropa.

Sabira estas romantika kaj humurema, aŭ pli precize, ŝi estas poeto. El la 3 ĉapitroj "Trajne", "Matene" kaj "Surstrate" ni vidas ŝian poetecon — la liberan kaj salteman pensadon, la delikatan kaj subtilan senton, kiujn esprimas ŝiaj originalaj lingvaĵoj.

Ŝi veturis per ordinara vagonaro kaj spertis vojaĝon de la plej ordinaraĵoj. Kvankam ŝin atakis nekutima sperto — multaj demandoj, laŭtaj krioj, insultoj... tamen ŝi volas ĉion sperti, "sen konsideri ĉu tiu ĉio malbonas aŭ bonas".

La ĉapitro "Surstrate" prezentas ŝiajn impresojn pri la stratoj de ĉinaj urboj: en sia unua mateno en Ĉinio, Sabira vidis surstrate maljunulinon vendantan glaciaĵon, buson plenan de homoj... en 1988 ŝi surpriziĝis pri la senfina fluo de biciklantoj kaj kriis "Biciklanto, vi estas reĝo!"; ŝi vidis ankaŭ biciklan akcidenton kaj florojn sur Tian'anmen-placo...

"Matene" montras la animstacion de Sabira post alveno je la 4-a horo matene al Chongqing

(Ĉongqing), monturbo en sudokcidenta Ĉinio. Estas sento de sola knabino pri nekonata urbo profunde dormanta.

Tiuj 3 ĉapitroj estas poeziaj kaj sensaj, el kiuj ni vidas la grandan diferencon inter Ĉinio, kie Sabira vojaĝis, kaj Eŭropo, kie ŝi kreskas. Eble ĝuste pro la diferenco ŝi iam ne volis reveni al Ĉinio, kaj ankaŭ pro la diferenco ŝi plurfoje venis al Ĉinio por studo, kaj... ŝi revenos.

Ilustrita per fotoj pri pitoreskaĵoj de Ĉinio, strataj vidaĵoj kaj brila rido de Sabira, la libreto konsistas el enkonduko verkita de s-ro Chun-Chan Yeh, fama ĉina verkisto kaj esperantisto, biografieto, terminoj, leteroj inter la aŭtoro kaj s-ro Umeda Yosimi, eldoninto de la libro, krom 6 ĉapitroj, kiuj, mi pensas, vicigas nek laŭ tempo nek laŭ enhavo. Eble tio estas tipaj puzleroj kaj plezuro de la aŭtoro. Tamen al tio mi ne kutimas, do mi serĉis regulecon inter ili. Fine mi kaptis ritmon, kiel leganto de la libro mi prezentu mian trovon al legantoj de mia artikolo. Jen la ritmo:

**poemo en prozo — notoj de vojaĝo**  
Trajne — Montoj, bankedoj kaj Konfuceo  
Matene — Sur la nekonata Ora Vojo

Surstrate — Spuroj

Ĉu mi pravas? Fakte por koni la libron ne sufiĉas recenzo, necesas mem legi la libron, kiu por mi estas perlujo, el kiu mi legis multe pri la kulturaj kolizioj kaj kunfandiĝoj inter Ĉinio kaj la ekstera mondo.

Pri la aŭtoro mi devas konfesi, ke ŝi estas bone konata de la ĉinaj esperantistoj. Ŝi multe kontribuis al la ĉina Esperanto-movado, ekz. por fondiĝo de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio ŝi multe laboris. Ŝi havas multajn amikojn en diversaj partoj de Ĉinio. En ŝia loĝejo en Germanio troviĝas multaj objektoj el Ĉinio: manĝbastonetoj, sojo, pipro, libroj, sonbendoj, artaĵoj...

Multfoje la eŭropaj amikoj ĝuis la ĉinecon ĉe Sabira, kaj ŝiaj amikoj en Ĉinio esperas, ke ŝi venos de la alia flanko de la Granda Muro al Ĉinio, lando "malantaŭ la muro". ■

## Nekrologo

S-ro Nagaoka Ziro, veterana japana esperantisto, forpasis en la 23-a de marto 1996.

S-ro Nagaoka Ziro naskiĝis en 1923. Li komencis lerni Esperanton en 1953 kaj poste estis prezidanto de la Yamagata Esperanto-klubo de Japanio, prezidanto de la Nord-Orient(japan)a Esperanto-Ligo kaj redaktoro de la revuo "Verda Sanatorio". Plurfoje li vizitis Ĉinion. Li estis ankaŭ konstanta aŭskultanto de Ĉina Radio Internacia kaj abonanto de "El Popola Ĉinio". Li donacis monon al Fondaĵo EPC-abono.

**Ĉina Esperanto-Ligo**  
Redakcio de "El Popola Ĉinio"



# Turismo ne plu estas revo

**C**INOJ, kiuj ĝuis alilokajn pejzaĝojn kaj morojn nur pere de libroj, bildgazetoj kaj televidaj programoj, nun jam eliris el la hejmo kaj eĉ el la lando. Se vi havos ŝancon kontakti kun ili, vi trovos, kiom ĝojaj estas tiuj ordinaj civitanoj, ke ilia revo realiĝis dank' al la ekonomia disvolviĝo.

## KUZINO REVENIS DE TAJLANDO

En la lasta somero mia kuzino kaj ŝia edzo venis al Pekino de la nordokcidenta landlima regiono Xinjiang (Ŝingĵang) por pasigi la mielan tempon. Ili partoprenis en la 7-taga Pekin-Tajlanda Vojaĝo aranĝita de la Ĉina Turisma Agentejo. Reveninte de Tajlando, la juna paro paslogis en mia hejmo. Parolante pri la 7-taga vojaĝo en Tajlando, mia kuzino tre ekscitiĝis: "Tiuj orbrilaj temploj, prezentado de Pataya-elefantoj, dancado de duseksuloj, la danĝerplena Krokodila Lago, fajnaĵ

kaj interesaj metiartaĵoj, diversaj fruktoj neniam prenitaj de mi, originalaj tajlandaj pladoj... Mi jam sentis, ke miaj kvin sensoroj ne sufiĉis por percepti ĉion ĉi! Jes, ni elspezis multe, tamen tiu ĉi miela vojaĝo donis al ni neforgeblan impreson. Mi do diru, ke la elspezo estas inda!"

Informiĝinte, ke la vojaĝkostoj estis ĉ. 20 000 juanoj, mia patrino al mi suspiris: "Nuntempaj ĝejnuloj multe enspezas kaj ankaŭ multe konsumas. La tempo ŝanĝiĝis. Antaŭ 30 jaroj mi edziniĝis al via patro. Ni jam estis tre kontentaj, havante du novajn vatitajn litkovrilojn. Pri vojaĝo ni neniam songis. La tutan vivon mi ŝpareme vivis, sed nur deponis iom pli ol 10 000 juanojn. Kiam mi estis juna, mi ne havis monon por vojaĝo. Nun mi maljuniĝas, mi povas iri jam nenien. Via kuzino ĉiujare lukras almenaŭ 10 000 juanojn per tajpado en sia hejmloko. Kompreneble ŝi povas tiom senĝene vivi."

Aŭdinte tion, mia kuzino refu-

tis: "Ne prave, onjo! Inter niaj kunvojaĝantoj multaj estas maljunuloj. Ili tre gaje pasigis la tagojn en la vojaĝo. Ankaŭ vi devas ŝanĝi vian ideon kaj iri eksterlanden por plimultiigi viajn sciojn, dum vi estas sana."

Mia patrino ankoraŭ hezitas elspezi sian tutan deponitaĵon por vojaĝi eksterlanden, tamen ŝi jam komencis fari vojaĝojn en la lando. Ŝi kune kun kelkaj maljunaj vidvinoj vojaĝis al Taishanmonto kaj Qingdao (Ĉingdaŭ). En januaro ĉijare ili vojaĝis al la nordorienta urbo Harbin por spekti glaciajn lanternojn. Ĉiujfoje, reveninte de la vojaĝo, mia patrino, kvankam tre laca, estas bonhumora. En la sekvaj tagoj ŝi foje-refoje rakontis pri sia vojaĝo. Vidinte, ke mia patrino estas tiom gaja, mi vere devis danki mian kuzinon, kaj mi jam decidis persvadi mian patrinon vojaĝi eksterlanden.

## BONHAVIĜO EBLIGAS TURISMON

En la pasinta longa tempo ĉinoj sciis nur laboron, preteratentante turismon kaj ripozon. Kiam mia patrino estis juna, turismo por ŝi preskaŭ ĉiam ligiĝis kun "alilandaj gastoj". Vojaĝi eksterlanden por multaj ĉinoj estis afero aspirebla sed neniam realigebla. De la lastaj jaroj en Ĉinio stabilas la socio, disvolviĝas la ekonomio kaj jaron post jaro altiĝas la vivnivelo de la popoloj. Oni jam havas superfluan monon libere disponeblan. En majo pasintjare Ĉinio ekpraktikis 5-tagan labor-sistemon, oni do havas 2 ripoztagojn ĉiusemajne. Dank' al

Ĉina turisto antaŭ la Reĝa Palaco de Tajlando



tio oni povas fari mallongajn vojaĝojn. Tiel turismo, kiel nova vivmaniero, estas pli kaj pli ŝatata de ordinaraj popolanoj.

F-ino Qi, kiu laboras en iu kompanio de Pekino, multe vojaĝis en la lastaj jaroj. Ŝi opiniis, ke en turismo oni povas sin reguligi kaj malstreĉi. Kun granda intereso ŝi rakontis al mi pri sia pasintjara vojaĝo en Vjetnamio: "Ĉe la landlimo en Guangxi mi ekveturis per malgranda ligna boato kaj baldaŭ atingis la alian bordon de la rivero. Mi fariĝis fremdulino sur la teritorio de Vjetnamio. En iu komerca strato mi ŝanĝis miajn 10 juanojn kontraŭ pli ol 10 000 vjetnamaj dongoj. Vjetnamaj vendistoj ĉu de kosmetikaĵoj ĉu de indiĝenaj produktoj ĉu de metiartaĵoj, ĉiuj venis kaj ĉirkaŭis min por oferti siajn komercaĵojn. Mi multe rikoltis de la vojaĝo kaj revenis hejmen kunportante multajn metiartaĵojn kun vjetnama trajto."

Kompreneble ne ĉiuj povas fari vojaĝon eksterlanden, ĉar Ĉinio ankoraŭ estas neriĉa. Tial, plejparto de ĉinoj, precipe salajruloj, elektas mallongajn vojaĝojn laŭ sia poŝo.

67-jara s-ro Sha enuadis en la soleca vivado en la unuaj tagoj post sia emeritiĝo. Poste li komencis ekskurson kun sia edzino. Post 2 vojaĝoj tute ŝanĝiĝis lia animstato. De tiam la maljuna paro ĉiujare faras unu aŭ du vojaĝojn en favora sezono.

Turistoj kiel s-ro Sha ja estas multaj. Ili havas kaj monon kaj tempon. Iu esplor-studento opiniis: "Oni bezonas monon por vojaĝo, sed kelkfoje vojaĝo ne havas rektan rilaton al mono. Bona vojaĝo dependas ne sole de mono." Laŭ lia opinio oni vojaĝas ripozcele por havigi al si facilan animstaton aŭ por sin malstreĉi. Ne estas necese, ke ĉiuj iru al famaj montoj kaj riveroj. Dum la lastaj jaroj li multe vojaĝis, ĉiufoje kun kelkaj kunuloj kaj kunportante simplan pakajon. Iam eĉ nerimar-

kinda sterila monto aŭ nekonata rivereto tiel absorbis lin, ke li tute forĝesis reveni.

## PLI DA HOMOJ ĜUU PLEZURON DE TURISMADO

Ĉinio areas 9.6 milionojn da kvadrataj kilometroj. Sur ĝi estas multaj famaj montoj, grandaj riveroj, historiaj lokoj kaj apartaj nacimalplimultaj vidindaĵoj. Kun rapida disvolvo de turismaj lokoj, la nombro de turistoj rapide kreskas. Pro tro rapida disvolviĝo neeviteble aperis iuj malkontentigaj aferoj, koncernaj al turismaj instalaĵoj, merkata administrado kaj servado. Ekzemple, en iuj lokoj kaŭze de streĉa trafiko, estas malfacile por individuaj turistoj aĉeti biletojn, kaj iuj eĉ estis trompitaj de biletsakristoj. Tial diverslokaj turismaj fakoj ekfaris reguligadon de la merkato kaj kompletigadon de la administrado, opiniante tion tiel grava, kiel disvolvo de turismaj lokoj, por ke turistoj vere ĝuu la plezuron de turismado.

Iuj turistoj jam trovis rimedon por eviti nenecesajn suferojn, t.e., partopreni en grupaj vojaĝoj organizitaj de turismaj agentejoj. Nun en Ĉinio servas pli ol 3 000 turismaj agentejoj speciale entreprenantaj enlandajn vojaĝojn. En la pasinteco plejparto de turistoj opiniis, ke individua vojaĝo estas la plej malmultekosta. Fakte, partoprenante en grupaj vojaĝoj organizitaj de turismaj agentejoj, oni ne nur ne suferas perdon ekonomie, sed ankaŭ ĝuas specialajn servojn de ĉiĉerono kaj oportunajn manĝadon, loĝadon kaj trafikadon. Ekde la 1-a de januaro 1995 la Ĉina Ŝtata Turisma Buroo oficiale praktikas Provizoran Difinon de Garantia Fon-



Turistoj el suda ĉina provinco Hunan vizitas la Imperiestran Palacon en Pekino.

duso por Servokvalito de Turismaj Agentejoj. Laŭ la difino turistoj ricevos kompenson, se ili suferos perdon dum vojaĝo pro malbona servado aŭ bankroto de la turisma agentejo. Julie de la sama jaro la Ĉina Ŝtata Turisma Buroo fondis kontrolan stacion pri turisma kvalito, kiu rekte respondecas pri plendoj kontraŭ turismaj agentejoj kaj pri kompensaj aferoj. Pro tio, ke la turisma kvalito estas garantiata, pli kaj pli multaj individuaj turistoj partoprenas en grupa turismado.

Laŭ statistiko, en 1995 la nombro de ĉinaj turistoj, kiuj vojaĝis en- kaj eksterlande, superis cent milionojn, 2.6-oble kiom tiu en 1985. Inter ili troviĝis oficistoj, studentoj, instruistoj, laboristoj, emeritoj, entreprenistoj kaj kamparanoj, kiuj okupas la plej grandan proporcion de la ĉina loĝantaro.

1996 por Ĉinio estas grava periodo por disvolvi la turisman aferon. La ĉina turisma afero jam eniris en etapon de daŭra kaj sana disvolviĝo kaj havas grandan latentan forton. La Tutlanda Konferenco pri Turismaj Laboroj okazinta en januaro ĉijare postulis, ke turismaj administrataj agentejoj perfektigu sian servon kaj merkatan ekspluatadon, por ke pli da ĉinoj ĝuu la plezuron de turismado. ■



### EKONOMIO

● Polietileno estas plej multe uzata speco de la arta rezino en la mondo. Ĝiaj produktivo kaj industria aplika nivelo markas nivelon de la petrol-kemia industrio kaj eĉ tiun de la industrio de iu lando. En 1970 la unua kompleto da polietilenaj produktaj instalaĵoj, importita de Lanzhou en nordokcidenta Ĉinio, komencis produktadon. Ekde tiam polietilena industrio iom post iom disvolviĝis kaj mildigis la kontraŭdiron inter produktado kaj bezonado de polietileno en la lando. Nun en Ĉinio funkcias 18 kompletoj da polietilenaj produktaj instalaĵoj kun jara produktivo de 1 447 700 tunoj, kiu leviĝos al 2 500 000-2 600 000 tunoj en la jaro 2000 laŭplane.



En la regadejo de la polietilena fabriko Qilu

● La ekspresa aŭtovojo 274 km longa inter Ŝanhajo kaj Nankino plene konstruiĝis. La aŭtovojo kun projekta rapideco de 120 km/h havas 4 koridorojn. La veturado de Ŝanhajo al Nankino bezonas nur 3 horojn.

● De 1996 ĝis 2000 iras la triaperioda konstruo de la kampŝirma forsto en nordorienta, norda kaj nordokcidenta Ĉinio. En la periodo oni arbarizos 4 milionojn da hektaroj kaj post tio la forstumita areo superos 10% en la regiono.

● En 1991-1995 la Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko de Ĉinio plenumis fikskapitalan investon de 241.4 miliardoj da janoj. En la 5 jaroj stariĝis 22 ĉefaj fotokablaj linioj kun totala longo de 100 000 km, la normoj de la ĉefa komunika kapablo kreskis averaĝe je 40% ĉiu-

jare. Nun en Ĉinio funkcias pli ol 85 milionoj da telefonoj.

● Februare de 1996 la submara fotokablo 549 km longa inter Ĉinio kaj Koreio ekfunkciis. Oni raportis, ke Ĉinio komencis investi kaj konstrui internaciajn submarajn fotokablojn en 1989. Fine de 1993 konstruiĝis la submara fotokabla sistemo inter Ĉinio kaj Japanio. Krome, Ĉinio partoprenis ankaŭ en la investado de dekelkaj internaciaj fotokabloj. La surtera fotokablo inter Ĉinio kaj eŭropaj landoj kaj tiu inter Ĉinio kaj sudorientaziaj landoj konstruiĝos kaj ekfunkcios post nelonge.

● Dum longa tempo ĉinaj mineralogoj serĉis minojn kaj taksis mineralajn riĉfontojn sur kampo, sed lastatempe ili per telesensaj bildoj endome determinis la grandan silvinan minon en nordorienta lago Lop Nur de Xinjiang. Tiu determinado estas tempoŝpara, malmulte konsumata kaj altpreciza.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Vicprofesoro Yang Zhongqi (Jang Ĝongĉji) de la Ĉina Nordokcidenta Forstokultura Instituto faris kontribuon al la esplorado pri parazitaj vespoj, naturaj malamikoj de iuj fiinsektoj. Li trovis 136 novajn speciojn de parazitaj vespoj kaj 6 novajn genojn, kaj rikoltis ĝojigajn sukcesojn en esplorado pri usona pieriso.

● Ĉinaj sciencistoj konstatis, ke krom la konataj energifontoj petrolo kaj naturgaso transformitaj el vivaĵoj, sur la ter globo estas ankaŭ gaso de hidrokarbonoj en la suna nebulozo, kiu sub iuj specialaj kondiĉoj havas komercan valoron kaj povas ŝanĝi en naturgason. Tiu trovo multe riĉigos la homan konon pri energi-fontoj kaj helpos serĉi novajn energi-fontojn.

● Bakteria malsano minacanta terpomon furioziĝis tra la mondo.

Agronomoj de la Ĉina Agronomia Akademio pene laboris 9 jarojn kaj fondis genoteknikan sistemon de antisepta peptido, akiris pli ol mil transgenajn plantojn kaj selektis tri antimalsanajn plantojn, kies kontraŭmalsana povo leviĝis je 1-3 gradoj kompare kun tiu de la plej fruaj plantoj.

- Ekde 1987 ĉinoj kunportigis en satelitojn semojn de verda fazeolo, pizo, tomato, sojfabo, hordeo, kukumo, ginsengo, rizo, tritiko, kotono kaj aliaj 20 plantoj por ekzameni ilian mutacian influon en la spaco de mikrogravito kaj la kosma radiado.

Post okjara ekzamenado la ĉina spaca plant-esplorado riĉe rikoltis. Ĉinaj sciencistoj selektis nombron da bonrasaj specioj. Ekz. ĉiu spiko de rizo nekunportita satelite donis ĉ. 130 grajnoj, dum tiu de la rizo traktita en la spaco — 316 grajnoj. Ili kulturis kvin novajn rasojn de rizo. Eksperimentite, ĉiu hektaro povas produkti 10 500 kg da rizo.

### KULTURO

- En Hainan-provinco de Ĉinio estas konstruata budhisma kultura distrikto kun areo de 166 hektaroj. En la distrikto konstruiĝos grandiozaj temploj, budhismaj vidindaĵoj de sudorienta Azio, kaverno de militisto-gardistoj de la Budho, budhisma seminario k.a. Sur la Suda Ĉina Maro ne malproksime de la menciita templo stariĝos kupra statuo de Avalokitesvaro, 93 m alta.

Tio estas alia grandioza moderna budhisma kultura vidindejo post la budhisma kultura urbeto konstruita en Nankino, Ĉinio. Nun tie jam estas konstruita kromtemplo de Nanshan, en kiu vivas dek bonzoj.

- La baleta trupo de Kantono, Guangdong-provinco, Ĉinio, sukcese prezentis en Pekino triaktan baletan "Anna Karenina", adaptaĵo kaj reĝisorado faritaj de fama franca koregrafo-reĝisoro laŭ la samtitola romano verkita de L. Tolstoj.

### ARKEOLOGIO

- Antaŭ nelonge oni trovis kelon de antikvaj moneroj en Dengfeng de Henan-provinco. En ĝi konserviĝis pli ol 60 kg da antikvaj moneroj el 41 specioj uzitaj en 9 ĉinaj dinastioj.

### MEDICINO

- La moderna Farmacia Centro de Tibetaj Medikamentoj en Xining kaj la najbara Tibet-medicina Hospitalo de Qinghai-provinco havas 1 200 kuracistojn. En la lastaj jaroj ili kuracis malsanulojn per tibetaj medikamentoj, preparitaj per originalaj teknologioj el metalo, ercoj, bestoj, plantoj kaj aliaj naturaj drogoj, kaj per droga bano, mokso, fumajado, urin-traktado k.a. Dank' al tio la antikva tibeta medicino distingiĝas en la

homa medicina kampo. Ĉiujare ili akceptis ĉ. mil pacientojn ĉinajn kaj alilandajn.

### SOCIO

- En 1995 1.87 milionoj da ĉinoj veturis pro privata afero al 170 landoj kaj regionoj.

- En la pasintaj tri jaroj Ŝanhajo, kiel urbo baldaŭ fariĝonta unu el la internaciaj ekonomiaj centraj urboj, invitis sinsekve 16 000 alilandajn fakulojn, kiuj tie laboras por longa aŭ mezlonga periodo aŭ faras mallongan interŝanĝan vizitadon. La municipo jam starigis rudimentan administran sistemon por alilandaj fakuloj.

- En nul horo de la unua de oktobro, 1995, la loĝantaro de Ĉinio (escepte de tiuj de Taiwan, Hongkong kaj Aomen) nombris 1 207.78 milionojn, je 74.10 milionoj pli multe ol tiu antaŭ 5 jaroj kaj 3 monatoj en 1990, kiam oni faris la kvaran tutlandan censon.

### MEDIPROTEKTO

- Oroĉunoj, kiuj sin vivtenis per ĉasado de generacio al generacio, formetis ekde 1996 sian ĉasfusilon kaj enviciĝis inter la protektantoj de sovaĝaj bestoj. Ekde tiam en la Granda Xing'an-montaro ne plu aŭdiĝas pafoj kaj la sovaĝaj bestoj povas trankvile vivi en la naturo.

- De 1994 Qingdao (Ĉingdaŭ), ĉemara urbo en orienta Ĉinio, ĉiuvintre okazigas "aktivadon por restigi mevojn". Dank' al tio miloj da mevoj fiksloĝiĝis en golfo de la urbo. En sunbrilaj ferioj tie la kolektive flugantaj mevoj kaj gajaj rigardantoj amike interrilatas, kio formas belan vidindaĵon en Qingdao.



Ĉe marbordo de Qingdao



# Tri bovloj da vino de tu-oj

**E**N la nordorienta parto de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo de Ĉinio vivas nacimultplimultanoj tu-oj, kies parto estas en la Huzhu-a Tu-nacia Aŭtonoma Gubernio, Qinghai-provinco. 25 kilometrojn sudoriente de la gubernio estas tu-a vilaĝo Bahong. Tie la pli ol 60 familioj kun 360 membroj konservas multe da tradiciaj moroj.

Survoje al la vilaĝo s-ro Xi Yuanming (Ŝji Jūanming), estro de la Gubernia Nacimultplimulta Komitato, konigis al mi, ke en Ĉinio troviĝas ĉirkaŭ 190 000 tu-oj. Ili havas sian propran lingvon apartenantan al la altaja mongola lingvo de la altaja familio. Antaŭe multe da iliaj folkloraj literaturaj estis disvastigitaj per buŝo. En 1980 la ŝtato helpis ilin fari latinan alfabeton. Tio utilas por malkovri kaj ordigi heredaĵon de la tu-a folkloro literaturo.

La tu-oj lertas en kantado kaj dancado. Inter la alt-melodiaj popolkantoj *floroj* estas la plej populara. *Floroj* estas dividita en du partojn: *kompletaj floroj* kaj *etfloroj*. La antaŭa perkante rakontas historiojn el famaj klasikaj romanoj, kiaj “Tri Regnoj” kaj “Pilgrimado al la Okcidento”. La lasta improvizas tekstojn kun simplaj vortoj por alegorie esprimi senton kaj deziron. Ĉar la *etfloroj* temas ĉefe pri amaferoj, ĝi estas nomata ankaŭ “ponto de amo”. En la tu-a distrikto, “lando de floroj”, preskaŭ ĉiuj estas verkintoj kaj kantontoj de *floroj*.

La ĉefaj dancoj de tu-oj estas Anzhao-danco kaj nupto-danco. En ĉiu festo la tu-oj sin vestas

per belaj vestoj, kolektiĝas en korto, ĉirkaŭas tendarfajron kaj sin distras per Anzhao-danco. Ĝenerale iu lerta maljunulo kantas la unuan duonfrazon, kaj la aliaj dancante sekvigas la duan duonfrazon. La spektaklo estas tre gaja. Kompreneble nupto-danco rilatas al nupto. La nupta proceso de tu-oj estas kompleksa. Ĝi konsistas el gefianĉiĝo, adiaŭo kaj akcepto al novedzino, geedziĝa ceremonio kaj festeno. Dum la proceso oni kaj kantas kaj dancas, de la komenco ĝis la fino.

Konversaciante ni atingis Bahong-vilaĝon. Ĝiaj domoj aperis antaŭ niaj okuloj. Ĉiuj familioj havas korton kun blanka muro. Sur la linteloj estas gravuritaj floroj simplaj kaj antikvecaj.

Geknaboj sekvis nian aŭton ĝojkriante: “Gasto venas, feliĉo venas!” Baldaŭ nemalmultaj vilaĝanoj kolektiĝis ĉirkaŭ ni. Tri 50-jaraj viroj portis po unu hada-on (blanka silka rubando) en la maldekstra mano kaj po unu bludeseĝnan porcelanan bovleton en la dekstra mano. Ili donacis hada-ojn al ni, ambaŭmane levis la bovlojn super la kapo kaj diris: “Tri bovlojn da vino pro deĉevaliĝo. Bonvolu, gastoj el Pekino!”

Gasto devas trinki vinon, antaŭ ol eniri la domon.



Fronte al plenbovloj da vino, ni falis en embarason: Se ni trinkas, ni ebriiĝos; se ni rifuzas, ni certe ŝokos ilian komplezon. En la momento, nia akompananto konsilis: “Tio estas kutimo de tu-oj. Ne decas, ke vi ne trinku. Trinku tri buŝojn anstataŭ tri bovlojn.”

Post trinkado ni invitate gastis ĉe maljunulo Li Yingchang. Kiam ni proksimiĝis al lia hejmo, li haltigis nin: “Momentum. Ĝus vi trinkis la vinon pro deĉevaliĝo. Bon-

volu trinki ankaŭ tri bovlojn por eniri la domon. Alie, oni ne permesos al vi eniri." Tiel ni refoje trinkis tri buŝojn anstataŭ tri bovlojn.

La familio havas korton el du partoj: la eksterā servas por bredi brutojn kaj konservi maŝinojn por prilaborado de tritika faruno, mangoleo kaj furaĝo; la interna estas loĝejo. Knabinoj estis farantaj brodadon sub alero. Vidinte nin, ili tuj stariĝis por bonvenigi nin en la ĉambron. Por montri sian respekton, ili metis sur la tablon skatolon kun rostita faruno kaj buter-floro sur ĝi. Samtempe la mastro alportis tri bovlojn da vino. Mi demandis: "Ĉi-foje pro kio la vino?" Li diris: "Pro via alveno de malproksime." Poste li regalis nin per sufiĉe da ŝafviando kaj frititaj farunaĵoj.

Dume ni informiĝis, ke en la familio vivas tri generacioj kun 13 anoj. Ili bredas 30 ŝafojn, 15 porkojn, 2 ĉevalojn, 1 bovon kaj 20 kokojn. Ili ankaŭ havas malgrandan traktoron. Ni ĝojis pri ilia riĉa vivo kaj kore deziris, ke ili vivu pli feliĉe.


Ĉe la adiaŭo la gastigantoj diris: "Laŭ nia kutimo, vi devas trinki tri bovlojn da vino pro via foriro." Por danki ilian komplezon, ni ambaŭmane akceptis la vinon kaj unuspire eltrinkis la lastajn tri bovlojn. Ne atendite, kiam ni estis enaŭtiĝontaj, s-ro Li Yingchang kuratingis nin: "Momenton, ankoraŭ aliaj tri bovloj da vino pro via surĉevaliĝo." ■



Tu-aj knabinoj feste vestitaj



Brodaĵoj faritaj de tu-aj virinoj



Kiu ĉampioniĝis?



## *Libroj eldonitaj de Ĉina Esperanto-Eldonejo de post 1991*

### **Filozofio, historio kaj politiko**

P004 Moderna historio de Ĉinio laŭ temoj 6.00 USD

### **Lernolibroj**

V008 Studoj pri Esperanto 6.00 USD  
V009 Paŝoj al pli alta ŝtupo 8.00 USD

### **Literaturo**

L010 Ĉinaj mitoj 5.00 USD  
L016 Legu kaj ridu 3.00 USD  
L024 Poemoj de Armand Su 4.00 USD  
L028 Speciala premio 2.10 USD  
L030 Mirrakontoj de Liaozhai 18.00 USD  
L031 Rateto volas edziniĝi 8.00 USD  
L032 Ruĝdoma sonĝo (Volumo I) 26.00 USD

### **Turismo**

T003 Enciklopedieto de Ĉinio 8.00 USD

### **Medicino, tekniko kaj scienco**

S004 Ĉina ceramiko 6.00 USD  
S008 Pri nia universo 4.00 USD  
S009 Rakontoj pri la historio de la ĉina  
medicino 6.00 USD  
S010 Provu por via sano 10.00 USD

### **Porinfanaj legajoj**

I014 Kapti ŝteliston 2.50 USD  
I019 Lerni pentradon 2.00 USD  
I020 Levi la ŝuon 2.00 USD  
I028 Pesi elefanton 2.50 USD  
I030 Rakonto pri Sima Guang 2.50 USD  
I032 Serĉi instruanton 3.00 USD


## **GALERIO**

# **Arĝenta kruĉo kun dancanta ĉevalo**

de YING ZI


En la baseno de la Flava Rivero oraĵoj kaj arĝentaĵoj naskiĝis en la 17-a jc. — la 11-a jc. a.K., kiam aperis la Silka Vojo. Pere de la ekonomia kaj kultura interŝanĝo enkondukiĝis en Ĉinion la okcidenta teknologio prilabori oraĵojn kaj arĝentaĵojn kaj pli kaj pli rapide disvolviĝis la metio de oraĵoj kaj arĝentaĵoj. En Tang-dinastio (618-907) produktado de oraĵoj kaj arĝentaĵoj atingis la kulminon de sia disvolviĝo. Tiam la kortego fondis specialan institucion — Metiejon de Oraĵoj kaj Arĝentaĵoj, destinitan por liveri tiajn objektojn al la mondumo.

Jen arĝenta kruĉo en formo de leda sako, 18.5 cm alta. Ĝi estis elterigita en la provinco Shaanxi (Ŝenŝji). Ambaŭflanke de tiu metiartaĵo, farita en Tang-dinastio, vidiĝas ĉevalo dancanta kvazaŭ proponanta vinon. La ĉevalo estis imitaĵo de tiu bredita de imperiestro Li Longji (712-756 sur trono). Oni diras, ke Li Longji havis 400 bonrasajn ĉevalojn, dresitajn ĉefe de li mem. En la oka monato laŭ la luna kalendaro ĉiujare, kiam oni solenis la datrevenon de lia naskiĝo, tiuj ĉevaloj do dancis laŭ muziko por gratuli la suverenon. La kruĉo montras la belan aspekton de la dancanta ĉevalo. La metiartaĵo estas tre delikata. Oni povas diri, ke ĝi estas distingiĝa artaĵo inter la oraĵoj kaj arĝentaĵoj de Tang-dinastio.





**BJ2020S**



**BJ2020SG**



**BEIJING JEEP  
CORPORATION, LTD.**



La Pekina Ĵipa Korporacio liveras leĝ-  
erajn aŭtojn en serio BJ2020:  
BJ2020S  
BJ2020SG  
BJ2020SG City Cruiser  
BJ2020SY (Kun malmola tegmento)

Prezo: ĉ. 6 000 USD (escepte de  
BJ2020SY)

Adr.: Beijing Jeep Corporation, Ltd, Chui  
Yang Liu, Chaoyang Qu, Beijing, 100021,  
Ĉinio

Tel: +86-10-67629435,  
+86-10-67629524

Fakso: +86-10-67629533

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语 《中国报道》 一九九六年第七期

(本刊代号:二—九—五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2